



NORDHUNGARIA INFORMO

ΛOKDHUNΓAPAKIA INΦOPMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*


Septembro - Oktobro 2010-a

6a jarkolekto nro 61-62

Enhavo

2010. estas ankaŭ la Internacia jaro de planedo Merkuro	3
Memormuro pri esperantistoj en urbo Pécs	4
La moderna terapio de la artrozo en Rumanio	5
Citaĵo	6
Blondulino	7
Naturaj Katastrofoj en la Mondo	12
Korekto, aldono de datumoj	15
Pedagogo de Zooĝardeno	16
La Miskonita Lupo	22
Ŝercoj	24
Internacia leterkesto	24
Volumo de profesoro Jozias Barboza	25
“BONA ESPERO”	25
La Amo	26
Legendo pri fino de paganoj en la regiono Mladá Boleslav	27
Legendo pri fera bastono	27
Legendo la pri fama loka rabisto Václav Babinský	27
Legendo pri boleslava buĉisto	28
Jaspers „La grandaj filozofoj - Kant“ pp. 486-487	28
LA FELICO	28
IJL sukcesa kaj daŭrigota	29
Ruĝa ŝlimo en Transdanubio	36
Datrevenoj	37
Rememoroj pri niaj famuloj	37

2010. estas ankaŭ la Internacia jaro de planedo Merkuro




Merkuro estas relative brila planedo. Nur Jupitero, Venuso kaj kelkfoje Marso brilas pli brile, ol Merkuro. Tamen ni povas observi malfacile ĝin, ĉar ĝi rondiras ĉiam proksime de la Suno. Sed ni vidu tion, kion komunikas la komisiita gvidanto al nia revuo. Ni dankas al sinjoro Zsolt Leitner, ĉar li plenumis nian peton.

Kelkaj indikoj pri planedo Merkuro:

De Suno mezurita meza distanco estas	58 milionoj de km-oj
Averaĝa surfaca temperaturo estas	350 C-gradoj
Plej alta surfaca temperaturo estas	467 C-gradoj
Plej malalta surfaca temperaturo estas	- 183 C-gradoj
Rondira tempo estas	88 teraj tagoj
Ekvatora radiuso estas	2440 km-oj: 0,3825-obla de radiuso de Tero
Tempo de rotacio estas	59 teraj tagoj
Maso estas	0,055-obla de maso de Tero: $3,3022 \times 10^{23}$ kg-oj
Volumeno estas	0,054-obla de volumeno de Tero: $6,08272 \times 10^{10}$ km ³

Oni nomis ĝin pri la komercistoj, pri vojaĝoj kaj pri romia dio de la ŝtelistoj. La romianoj identiĝis al Hermes, kiu estis delegito de dioj en la greka mitologio, defendanto de la pasaĝeroj kaj gvidanto de la mortaj animoj. Tiel ŝajne ĝi ricevis tiun nomon pro tio, ĉar tre ege rapide moviĝas en la spaco rilate al la fiksaj astroj. Kalkulite de la Suno ĝi estas la unua granda planedo. Ĝi estas t.n. Tero-tipa planedo, aŭ ŝtonaĵplanedo, kiu havas firman surfacon. Sur ĝi estas ege granda temperaturŝanceliĝado, ĉar mankas la signifa atmosfero: nenio povas stori (?) dum tago la planedon kaj nokte nenio povas varmigi ĝin. La planedo ne kapablas konservi atmosferon, ĉe gravita efiko de la planedo estas malgranda kaj tiu de Suno estas granda. Minimuma atmosfero estas konsiderebla en malgranda kvanto, kiu enhavas heliumon, natrion, argonon, magnezion, kalcion, neonon, ksenonon, oksigenon kaj hidrogenon. Sur la planedo ne estas akvo pro la alta temperaturo kaj la tre ege malgranda aerpremo, sed proksime de la polusoj – kie la temperaturo estas -150 C-gradoj – akvo estas imagebla en formo de glacio.

Ĝia surfaco estas kalva, kiun dividas basenoj, altebenaĵoj, ebenaĵoj kaj krateroj. Tiuj formiĝis tiel ŝajne dum frua epoko de la Sunsistemo, dume la ŝtonaĵruboj – kiuj kreis la planedojn – en formoj de meteoritoj falegis sur la surfacon. La plej granda ĉi tia formacio estas la baseno-Caloris, kies diametro estas 1300 km-oj, kiu iu de plurobla samcentra montoringo zonita krateromaro.



/ La bildoj de Merkuro devenas el la Hungara Vikipedio/

Surfacajn formaciojn de Merkuro oni nomis pri artistoj, ekz. tie estas krateroj Beethoven,-Bartók,-Jókai. La ebenaĵoj estiĝis tiel, ke la meteoritoj ege forte falegis kaj pro tio la lafo elŝprucis de sub la krusto kaj disfluis sur la surfaco.

Interna strukturo: Sub la maldika krusto estas pli dika mantelo, sub kiu estas eg abunda ferenhava nukleo, kio estas ĉirkaŭe tri kvarono de diametro de la planedo. Averaĝa koncentriteco de la planedo estas treege granda rilate al ĝia dimensio.

Spacsondilo Mariner-10: Oni ekirigis tiun en 1773; ĝi alproksimigis la planedon en 1974 trifoje; ĝi faris plurmil forojn; Ĝi mezuris magnetan kapon de Merkuro kaj la valoro estis treege granda. Sur ĝia sunbrila flanko la el Suno elfluanta plasmio kunpremas la magnetan kampon al la surfaco. Sur la kontraŭa flanko estiĝas iu longa „magneta kometo-vosto.”

La 3-an de aŭgusto 2004 ekiris sondilo-Messenger de NASA. Ĝia tasko estis kartografado de la planedo./surfaco, atmosfero, interna strukturo, materiala konsisto, ktp./

Demandoj:

- Kial enhavas **la** plej pluran feron tiu ĉi ŝtonaĵplanedo?
- Kial nur tie ĉi estas trovebla – krom la Tero – tergloba magneta kampo?
- Kiel povas resti volatilaj materialoj sur la polusa regiono?

Laŭ la novaj observadoj unu parto de la metala nukleo en interno de Merkuro tiel ŝajnas estas fandiĝante, kiu generas magnetan kampon.

Zsolt Leitner
komisiita gvidanto de Observatorio de Miskolc
Esperantigis László Pásztor

Memormuro pri esperantistoj en urbo Pécs

En la pli frua numero de nia retrevuo ni raportis pri niaj travivaĵoj akiritaj dum la Amika Renkontiĝo de Fervojistaj esperantistoj en la hungara urbo Pécs. De tiam ni ricevis la tiam promesitajn fotojn pri la evento kaj pri ties lokoj. Bonvolu rigardi la fotojn, ricevitaĵn de sinjoroj István Gulyás (Budapeŝto), Jozefo Halász (Miskolc) kaj István Sutka (Kelebia).





sendintoj estis István Sutka, István Gulyás kaj D-ro József Halász

D-ro Gábor Lázár

La moderna terapio de la artrozo en Rumanio

La artrozoj estas degerenaj malsanoj de la artikoj, kiujn karakterizas la doloroj en la artikoj. Por la terapio en Rumanio ni havas pli novajn medikamentojn: STOPARTROZO FORTE kaj STOPARTROZO ULTRA. La STOPARTROZO FORTE enhavas glukozaminon sulfaton 1128 mg-ojn kaj kondroitano sulfaton 250 mg-ojn. La STOPARTROZO ULTRA enhavas glukozaminosulfaton 850 mg-ojn, kondroitano sulfaton 460 mg-ojn kaj metilsulfonilmetanon 500 mg-ojn. La STOPARTROZO FORTE havas rolon en maljunecaj procezoj, aŭ malpliigas ĉe la kazoj de akcidentoj la sintezon de la proteoglikonenoj en la homaj histoj, kiuj havas rolon en la molaj konjunktivaj histoj kaj samtempe en la elastaj histoj. La glukozamino estas natura substanco aminoglucida, kiun enhavas la homa organismo precipe en la kartilago de la artikoj, kie havas rolon gravan en la mobilizo de la artikoj kaj en la sintezo de la konjunktivaj histoj. La kondroitino estas natura komponanto de la homa organismo. Pere sinergisma agado de la substancoj malrapidas la evoluon de la artroza malsano kaj pliboniĝas la mobilizon de la artikoj kaj malpliigas la dolorojn. Pro la natura komponanto de la homa organismo la du substancoj estas bonege tolereblaj kaj ne havas sekundarajn efikojn. La STOPARTROZO FORTE havas efikon post 3-4 semajnoj de la uzado, kiu estas daŭre ankoraŭ post la ĉesigo de la aplikado.

La kontraŭindikoj de la uzado: la gravedaj virinoj, kiuj suĉigas suĉinfanojn, la diabetuloj kaj kiuj uzadas heparinon, kiu estas **antikoagulilo** medikamenta. Same estas kontraŭindika por tiuj, kiuj suferas en fenilketonurio.

Aplikado: La enhavon de la saketo oni devas solvi en glaso da akvo, kaj trinki unufoje dum manĝado dum 40-60 tagoj. Oni rekomendas ripeti la administradon kvarfoje dum jaro kun 6 se semajnoj paŭzoj. La STOPARTROZO FORTE-n produktas la S. C. ROMPHARM KOMPANIO S.R.L. kun S.C.SLAVIA FARM S:R:L:RUMANIO.

La STOPALTROZO ULTRA estas suplementa nutraĵo, kiu enhavas glukozaminon sulfaton,

kondroitinon kaj metilsulfonilmetanon. Metilsulfonilmetano estas sulfura metalonido, kiu estas disvastiĝinta en la naturo. La sulfuro estas la kvara minerala substanco en la homa organismo, kiu havas esencan rolon en la funkciadaj procezo en la kreskado kaj regenero. La metilsulfonilmetano estas trovebla en multaj nutraĵoj, en fruktoj, legomoj, viando, fiŝoj kaj en la lakto, sed tiujn oni devas konsumi krude, sen kuirado. Kiam unu ĉelo neniĝas, la alia nova ĉelo anstataŭiĝas. Sen la sufiĉa kvanto de metilsulfonilmetano la ĉeloj estas rigidaj aperas perturboj en la funkciado de la pulmo kaj en la aliaj organoj. La metilsulfonilmetano helpas la maltoksiniĝon en la organismo kaj la bonan cirkuladon de la sango. La metilsulfonilmetano malakcelas la inflamon kaj helpas la muskolajn histojn en la resaniĝo. La substanco havas rolon en la formado de la keratino, proteino de la haŭto, ungoj kaj la kolageno, kiu havas rolon en la elasto de la fibroj. La sulfuro helpas ankaŭ la produkton de la imunoglobulinoj, kiuj estas gravaj en la imunsistemo. La metilsulfonilmetano havas ankaŭ rolon en la nekrofagio kaj kontraŭ de liberaj radikoj, malpliigas la alergiajn reagojn de la nutraĵoj, pollenoj kaj regulas la gastroacidon. Pere de la sinerga agado de la tri substancoj, kiujn enhavas la medikamento, malrapidigas la evoluon de la artrozo, plibonigas la mobilizon de la artikoj kaj malpliigas la dolorojn.

Indikoj: La STOPARTROZO ULTRA helpas la mobilizon de la artikoj, malpliigas la inflamojn en la muskolaj histoj kaj la artikajn dolorojn. Post la traŭmoj helpas la kuracadon de la degeneraj fenomenoj.

Administrado: La STOPARTROZO ULTRA-n oni solvas en glaso de akvo, kiun oni trinkas unufoje potage dum manĝado dum 40-60 tagoj, kiun oni povas ripeti kvarfoje dum unu jaro kun 6 semajnaj paŭzoj.

Kontraŭindikoj: Alergio de glukozamino, kondroitino, metilsulfonilmetano.. Gravedaj virinoj, kiuj suĉigas suĉinfanojn kaj uzadas kontraŭkoagulilojn, kaj sub la 18-a jaraĝo, fenilketonurio.

La STOPARTROZO ULTRA-n produktas la S.C. ROMPHARM KOMPANIO, S. R. L. Rumanio.

Resumo: La aŭtoro konigas 2 efikajn rumanajn medikamentojn, **kiujn oni** uzadas sukcese en la kuracado de la arttrozoj.

D-ro Gábor Lázár
emerita ĉefkuracisto
Cod RO-525200 COVASNA
str.Stefan cel Mare 26 A
Rumanio

Citaĵo

„La homo iutage subite ekkomprenas, ke nek mono, nek potenco, nek progreso gravas plie en la vivo, ol tio, ke iu amu lin/ŝin” (Goethe)

Esperantigis László Pásztor

Adrienne sinjorino Pásztor
Blondulino....

Multaj biografioj komenciĝas laŭkutime ĉi tiel: „ Mi naskiĝis dum bela, stelluma nokto, laŭ la deziro de miaj gepatroj....”

Mi alvenis en la mondon post multaj nebulaj, grizaj tagoj kun glacio, neĝo degeliĝanta pro vento, kun la unuaj pli varmaj sunradioj. Mia avo tuj nomis min Sunradinjo. Tiun tagon la vetero estis kaprica kiel kutime estas printempe.

En la hospitalo, kie mi naskiĝis, vizitis nin multaj aĝaj virinoj de mia parencaro. Laŭ la ĉi-taga ŝanĝiĝema vetero ili antaŭdiris, ke mia vivo unue havos multe da nebuloj, sed poste ĝi estos sunradie ĝoja, ĝis la fino de mia vivo.

Sed por mia vivo ne praviĝis la superstiĉa antaŭdiro. Veras, ke min, kiel filineton – alvenintan post miaj multe pli aĝaj fratoj – oni troe dorlotis, sed la familia ekvilibro egaliĝis post la naskiĝo de mia fratineto. Mia patra avo – tiu soldate rigora maljunulo – pleje min amis el inter siaj kvar genepoj. Kiam mi estis ankoraŭ malgranda, li sidigis min foje-foje sur siajn genuojn kaj hungare, aŭ germane kantis al mi kelkiujn el inter siaj plej favorataj kantoj. Tio estis ekzemple la kanto de la hungar-cigana muzikisto Dankó Pišta, kiu komenciĝis ĉi tiel: blondulineto ĉit, ĉit, ĉit. Ĉi tiu kanto iĝis kara por mi, ĉar ankaŭ mi estis blonda kaj mia amata avo kantis ĝin ĝuste al mi.

Lia kantado min ĉiam gajegis. Krome la belsona lingvo Esperanto – ellernita de li – iĝis nia sekreta, nur nia propra lingvo, kor’ al koro. La kantoj de mia patra avo iĝis mia koro kantindaj kaj aldone la fabeloj de mia patra avino faris bela mian infanecon. Ili plantis en mian animon la amon al la vivo, al la patrujo; la hungaraj kaj germanaj regionoj. Al tiuj regionoj mi povis aldoni ankaŭ la nian, kie ni vivis kun siaj ĉiuj koboldoj, nanoj kaj feinoj.

Kaj foje-foje temis la rakontoj ankaŭ pri niaj tre malnovaj, iamaj antaŭuloj restintaj sur hungaraj teritorioj. Tiel jam ekde mia junaĝo nestiĝis inter miaj pensoj la demando: kio estis kaj kio povas esti en la fora Hungarujo, kio ne estas ĉi tie en Germanio? Kial ne revenis hejmen tiuj malnovaj forstistoj, ĉasisitoj? Ĉu sur la ĉasvojoj estis ili la ĉasistoj, aŭ ili iĝis la predoj? Miaj bavardevenaj praavoj ĉiam estis arbohavantoj, forstistoj, ĉasistoj.

Dum mi kreskis, mia familio deziris, ke ankaŭ mi havu ian profesion ĉe nia arbaro. Vere, mi havis emon tiurilate, sed sentis inklinon ankaŭ alirilate. Fine mi solvis la demandon por ĉies kontento. Mi estiĝis forstisto, sed samtempe finis ankaŭ pedagogian altlernejon. Mi akiris diplomojn pri instruado de la forstistaj sciencoj, pri la lingvoj germana kaj angla kaj pri gimnastiko-fako. Do, post fino de miaj studoj mi komencis instrui miajn fakobjektojn en la forstista mezlernejo funkcia sur teritorio de ni arbarego. Krome mi iĝis ankaŭ gvidanto de la lignouzino tie. Mi havis multe da okupiĝoj, sed mi fatis ĉion per granda energio.

Miaj geamikoj estis same aĝemaj kiel mi. Je nia agado kreiĝis tenisa kaj majoreta grupoj, koruso, orkestro de arbarmastrumaj laboristoj, kiuj merite gajnis rekonon ankaŭ inter la malproksimaj mezlernejoj.

Ni, membroj de nia familio, la konatuloj, parencoj, laboruloj kaj instruistoj vivis ĉi tie tiel, kvazaŭ ĉi tiu loko estus ĝoja insuleto en la kaosa mondo.

Neatendite alvenis nova instruisto, petante, ke li povu instrui ĉe ni. Nia direktorino diris, ke la nova instruisto estas altvalora homo. Li estos trezoro por ni, sed bedaŭrinde li ne restos ĉe ni longe. Li instruas en universitato kaj preparas sin akiri iun universitatan studan titolon kaj konvene laŭ atendo li pli facile atingos ĝin per ĉi tiea ekzerco. Ĉiuokaze Henri Kirner, la nova kolego alvenis precize kalkulante la tempon. Li pendigis sian jakon, salutis nin, la aliajn instruistojn kaj tuj iris instrui. Finante siajn laborhorojn, li prenis la jakon, salutis nin la ĉeestantojn en la instruista ĉambro kaj tuj iris for. Neniam li restis por iom interparoladi. Tiu

ĉi maniero povis ĝeni ankaŭ nian direktorinon, ĉar la aranĝon de nia sekva lerneja soleno ŝi komisiis al li kaj mi. Tiun komisiitan taskon li ne eblis rifuzi.

Mia plano: kiel aranĝi la feston – por konsenti ĝian plivastigon kaj kompletugon – mi transdonis al sinjoro Kirner. Tiam okazis mia unua surprizo. Niaj planoj estis preskaŭ samaj, ĉar nin estris samaj pensoj. Ni pensis gravaj la samamajn farenadaĵojn. Tio estis la unua okazo, kiam ni povis ekrigardi la pensojn unu de la alia. Kaj ni gratulis unu al la alia preskaŭ samtempe. La festo okazis ege bone. Post la solenaĵo la entrepreno aranĝis ĉasadon, kiun partoprenis nek sinjoro Kirner, nek mi. Dum nia foresto mi devis prezenti al sinjoro Kirner la lignodeponejon kaj la seguzinon. Necesis, ke li spertu, kiel ni subtenas la lignoindustrian-forstistan mezlernejon. Tre atenteme li rigardis ĉion dum mia prezento, foje-foje li ankaŭ pridemandis. Tiam evidentiĝis ankaŭ lia kono pri la lingvo Esperanto, kiam iun aferon mi klarigis hazarde duone esperante kaj li pridemandis ĝin same esperante. Sinjoro Henri, sekvante tian fojon, komencis veni pli ofte pli frue por instrui kaj tiam li interbabiladis kun mi kaj kun gekolegoj. Li interesiĝis pri la malfacilaĵoj de la studobjektoj de mi instruataj. Foje li donis instruajn konsilojn.

Intertempe alvenis nia trideka naskiĝtago. Mi komencis sperti tiutempe jam, ke miaj geamikoj geedziĝis kaj el la novaj geedzoj ne ĉiuj volis daŭrigi la amikecon kun mi, kun la solulino. Aperis dume kaj komencis amindumi al mi trejnisto de nia tenisteamo.. Li provis kisadi min, lian brakon li metis sur mian ŝultron kaj tiam li ektuŝis mian mamon per iuj siaj fingroj. Nek lin, nek tian lian agadon trovis mi simpatia. Kiam li aperis en mia proksimeco, mi ĉiam foriris de apud li.

Post ne longa tempo la trejnisto sciigis nin pri tio, ke li invitis iun hungaran tenis-teamon al ni por gastludi, kaj ili – akceptante la inviton – reenvitis nin al ili, somere.

La tenis-teamaj gastoj okazigis grandan intereson, ĉar Hungaroj tre malofte vizitis nian regionon. La ludo plenigis per ĝojo kaj refreŝigis min. Post la egala rezulto gratulis min sinjoro Kirner kaj akcesore rimarkis, kiel bedaŭrinde estas, ke mi ankoraŭ ne verkis la lastfoje de li proponitan sciencan traktaĵon. La rimarkon mi lasis sen respondo, ĉar tiutempe mi jam komencis senti kaj foje-foje per pligrandiĝanta forto, ke ankaŭ mi volas aparteni al iu. Mia sopirpostulo estis, ke mi havu iun, kiu ne nur admiru, sed ankaŭ amu min kaj ne vidu nur kolegon en mi.

Dume mi kaŝobservis inter miaj kolegoj ankaŭ kolegon Henri Kirner. Multfoje mi pensadis pri li. Kia povus esti por mi la ideala edzo? Ĉu li estus tia? Fine mi rezignis pri li, ĉar li estis troe serioza. Mi povis nur tre malfacile okazigi malgrandan rideton en liajn okulojn. Sed mi sentis ankaŭ tion, ke kolego Henri estas ĉiam fidinda, bonkore helpema, vera justulo kaj kiel tiu de mia avo ankaŭ lia koro pleniĝis per kantoj, muziko. Kiam li donacis al mi siajn popolkanto-tradukojn, li honorigis min per sia fido. Senrompe li fidis, ke ankaŭ mi povos iĝi scienculo.

Nu, mi kelfoje skribis forstistajn informojn pri arbospecioj de nia arbaro, pri la arboj difektataj de damaĝaj insektoj, pri malsanoj de arboj kaj pri naturaj kaj kemiaj defendiloj uzataj kontraŭ ili. Ĉi tiu temo ne estis faka tereno de Henri, sed li ege forte prijuĝis miajn artikolojn. Nu, Henri poste montris kaj klarigis la mankojn de miaj laboraĵoj kaj montris kiamaniere mi povus prilabori la temon pli komplete. Li instigis min al ĉiama memklerigo. Li daŭre instruis min al io, kaj fine mi ne suferis malutilon pro la konateco estanta kun li. Li iĝis mia spirita gvidanto. Dum la tempopasado mi ekŝatis, eĉ ekamis lin. Mi dezirintus danki, rekompenci la prizorgadon, la fidon ricevitan de li, sed neniam venis okazo kaj mi sentis min ĉiam kiel lia ŝuldanto.

Mia kaŝita amo kaŭzis kutimon neakcepteblan por mia familio. Okaze de diskutoj, kiam estis demandite mia opinio, mi kutimis respondi jene: „ Henri dirus tion,...aŭ: Henri certe ne elektus ĉi tiun proponitan solvon de la problemo....”

Por forpreni min el tiu opiniita „magia rondo” de Henri, mia patro akceptis inviton por vojaĝi en Nord-Hungarujon al somera cervo-observado kaj li vojaĝigis kun si krom aliajn du ĉasistojn, ankaŭ min.

„La hungara arbarmastrumejo igis tre agrabla la tiean viziton de la germanaj ĉasistoj” – skribis mia patro pli poste en iu loka ĵurnalo. Sed jen kiel vere okazis ĉio.

Iu 35.-jara distriktoĝvidanta forstisto, Elek Majoroŝ organizis la cervo-observadon. Kaj ĝi kaj la nova invito de la Hungaroj – „atento pri la cervoblekado” - havigis grandan ĝojon al mia patro. Alitage ĉi tiu sinjoro forstisto invitis la tutan societeton al gulaŝo-tagmanĝo kuirita en kaldrono. La gastigado okazis sur la kampo antaŭ lia domo, kiu situis en pli alta parto de la valo. Surprizis min la moderna domo de Elek pro tio, ke ĝi estas egale for kaj de urbo kaj de vilaĝo. Al lia dombestaro apartenis unu azenino, nomate Manci, / kiu komprenis esperante /, vertaga paro kaj unu katino. Al mia karesado per herbobukedo kaj esperantaj vortoj la azenino respondis per fortvoĉa ĝoja azenblekado kaj vostosvingado. Ĝia unua posedanto tiel amuziĝis, ke li regule esperantlingve alparoladis la azeninon. Ankaŭ la striita kato ne konsideris min fremda. Ĝi tuj ekhavis agrablan lokon en mia sino kaj komencis ronroni je mia amema karestuŝeto.

Mi demandis de iu ĉasisto: kion mi devas scii pri nia gastiganto. Li tion respondis, ke Elek devas zorgi pri knabino, sed neniu alia vivas kun li. Kiam mi plue demandis mian partneron iu vokis lin for. La demando restis nerispondita. Dum la preparo de la manĝado mi faris promenon en la arbaro malantaŭ la domo, ĉar mi volis pli multe rigardi la tre sopiratan Hungarujon. La arbaro servis per agrabla malvarmeto. Baldaŭ mi atingis iun muskan rokon. Ĉirkaŭanta ĝin mi rimarkis vojeton – kiun mi pli frue ne rimarkis - , laŭ kio mi povis atingi la rokpinton. Kaj tie sidadis kaj kuŝis mi longe. Mi ĝuis la silenton kaj la sunradiojn malfiltrigantajn inter la verda foliaro. Mi pripensadis: Kiom da landoj mi vizitis ĝis nun kaj tamen mi trovis mian karulon nenie. Kio povas esti ties kaŭzo? Ĉu mi estas tro postulema? Poste mi pensis, ke nenie mi trovos viron, similan al Henri Kirner. El miaj pensoj unue mallaŭta brueto, poste fortbruaj paŝetoj vekis min. Unue aperis unu melhundo, kiu signis per vigla jelpado mian ektronon. Poste ankaŭ Elek Majoroŝ ekaperis de malantaŭ la arbegoj.

„Ha! – ĉi tie estas vi, fuĝinto!” – komencis skoldeti min nia gastiganto. – „Ĉu vi ne scias, ke vi ne decas longe resti for de la societo? Povus atingi vin iu damaĝo sur mia ĉasvojo!” – diris Elek, sed tamen kontenta estis trovinta min. – „Ekzemple ĉi tie, se vi paŝos malĝuste, - kaj li montris la rokan vojeton – vi povus enfali en la kavon de roko kaj vundi viajn piedojn. Tiukaze kiel vi dancos kun mi dum la vespera amuziĝo? Donu do vian manon kaj mi helpos malsupreniri de la roko. Paŝu tien, kien mi montros!” – li proponis kaj bonvole li etendis sian brakon al mi. Senvorte mi akceptis la etenditan manon, obeeme mi sekvis liajn konsilojn kaj iome mi hontis mem post la skoldeto. Je la lasta paŝo li ĉirkaŭbrakis min kaj kisis mian vangon.

„Bone , ni povas jam reiri al la societo” – diris li kaj ni ekiris kune mano en mane en direkton de la domo. Sendamaĝe mi reatingis la societeton de mia patro, kie poste Elek deklaris, ke li trovis min „sur lia ĉasvojo kaŝanta multajn danĝerojn por fremduloj” ĝuste tiam, kiam mi venis jan reen. La aliuloj ridis okulumis al mi por kompreni: mi estis inter bonaj manoj kaj estas jam ĉio en ordo. Al mi precipe plaĉis, ke li ne hontigis min pro mia forvago. Nu, mi iĝis nek ĉasisto nek predo – mi pensis.

Por la konsumo de la kaldrona gulaŝsupo ni devis sidiĝi sur ion. Oni elportis grandajn kverkotablojn kaj benkojn el la domo kaj je akompano de gramofona muziko ni gaje gustumadis la kuiritaĵon de nia afabla dommastro kaj la trinkaĵon, kiun li regalas por trinki. Pli poste mi ankaŭ dancis kun Elek. Dum dancado li brakumis min tiel, kvazaŭ li volus lasi min neniam plu. Poste sekvis kantado. Mi ne povis sufiĉe miri, kiom multajn kantojn konas la Hungaroj. Ja ili kantis ĉefe hungarajn kantojn. Sed per kia korvarmiga beleco! La bele sonoranta kantvoĉo de Elek sorĉis min tute. Enpense mi komparis lin kun Henri. Lian

konduton mi trovis pli mola, ol tiun de Henri. Mi konstatis, ke ankaŭ Elek estas tre serioza, sed li ofte ridetis, kiu tre konvenis al li. La konsumita vino levis mian humoron, mi fartis tre agrable. Kiam Elek petis min, por korespondi post mia hejmeniro, mi volonte jesis. Ni ŝanĝis adresojn kaj telefonnumerojn, poste ni interkonsentis pri nia nova renkontiĝo en aŭgusto, kiam nia tenistaĉmento akceptante la inviton gastludos en Hungarujo. Bona estos denove interparoladi kune.

Nu, alvenis la tempo de nia hungaria gastludo, kiu bone sukcesis kaj nia gastoakcepto estis tre sincere bonkora. Alvenis ankaŭ Elek rigardi nian ludon. La trejnisto de la hungara taĉmento – kiu eĉ ne sciis, ke ni konas jam unu la alian de pli longe – petis lin, amuzigi min, ĉar tiel ŝajnis, ke ĉiu havas jam partneron, nur mi ne.

Post tiu ĉi kazo okazis, ke spektante la boatan konkurson sur lago Hámori ĉe mia flanko dekstre staris nia germana trejnisto kaj maldekstre staris Elek. Nia trejnisto denove povis konfideneumi kun mi. De lia flanko mi devis plie alproksimiĝi al Elek, ĉar inter la barilo de la lago kaj la landvojo kondukanta malantaŭen ne troviĝis sufiĉa loko por preterpasi. Unue Elek ne komprenis la kaŭzon de mia movo, sed poste tamen komprenis ĝin, kiam li rimarkis la trejniston starantan rekte apud mi. Malantaŭ de mia dorso li kruĉmetis lian manon kaj prenis la apogrelon apud mi. Tiel apartigis li min de mia trejnisto, kiu baldaŭ ĉesigis sian molestan intencon, vidante la fortan pugnon de la viro staranta apud mi. Mi staris en tuja proksimeco de Elek, mi preskaŭ alpremiĝis al li. Vidante, ke la danĝero jam pasis pro foriro de la trejnisto, mi dankis al Elek, ke li savis min kaj rektiĝinte mi volis liberigi min el lia brakumo. Sed, ĉar Elek lasis sian brakon samloke, ne volante afliki lin, mi ne detiris min de lia brako. Sed post nelonge Elek invitis min eniri la hotelon Palaco, ke mi ne malvarmumu pro la intertempe ekblovanta malvarma venteto. Post nia eniro li demandis min: se li nun forirus kaj revenus ĉirkaŭe je la noktomezo, ĉu mi atendus lin spite de mia laceco pro la laciga tago? Li diris, ke li ne povas pasigi kun mi ankaŭ la vesperon en forstista uniformo. Li devas transvesti sin, sed kiel mi scias, li loĝas malproksime. Post mia jesa respondo li foriris.

Mi iris poste en mian gastoĉambron por transvesti min. Mi surmetis helbrunetan jupon kun blanka bluzo. Estis varma vespero. En babilejo de la hotelo Palaco unue mi aŭskultis muzikon, poste rigardadis la ŝakludantojn apud la majstre lignoskulptitaj marketritaj ŝakotabloj. La tempo malrapide pasis. Miaj taĉmentanoj jam komencis susuri: mi ne atendu plu, ĉar Elek jam ne revenos, vane mi atendas lin. Sed io sufloris, ke jes, li revernos.

Kaj je kvin minutoj antaŭ la noktomezo li enpaŝis. Li surhavis flavbrunan someran kompleton kaj tuj paŝis antaŭ min. Bona sento plenigis min, ĉar koncerne niajn vestaĵojn harmonio estis inter ni jam je lia ekveno. Ni vespermanĝadis kune kaj dancis. Miaj teamkunuloj surprize atentis mian partneron, kiel li daŭre amuzigas min. Dum nia babilado li rakontis pri sia mortinta edzino, pri ŝia filineto, devenante de ŝia unua edziniĝo: tiun knabinon li adoptis kaj sole edukas. Tiu knabino bezonas patrinon, li edzinon. Li sopiras tiun edzinon, kun kiu lin ligos geedziĝo baziĝanta sur kompreno, serioza amikeco kaj amoro. Mi rimarkis, ke dum nia dancado li denove tiel brakumis min, kiel la iaman fojon. Rememorante la ricevitan kiseton sur la ĉasvojo kaj mian savon de la trejnisto, ĉi tiu brakumo ne efikis min malbone kaj denove agrable influis min ankaŭ lia kantado. Kantis li ĉion: kaj malgajajn kaj gajajn kantojn.

Mi fartis bonege kaj ankaŭ la dume konsumita vino de „Montosuba Vinregiono” el vilaĝo Mád, havigis al mi sian efikon. Nur miaj dekoltitaj ŝuoj agis malagrabla. Ili vundfrotis miajn piedojn. Mi ne povis plu danci. Elek akompanis min reen al mia tranoktejo.

Ni adiaŭis jam plurfoje unu de la alia, kiam li demandis min:

„Sunradieto! Ĉu ni renkontiĝos ankoraŭ iam?”

Aŭdante kaj ĵus de li ĉi tiun mian karesnomon, mi tre surpriziĝis. De kiu li scias, ke mi estas alparolata tiamaniere, karesume? De kie li konas ĉi nomon?

Li informis min, ke la aŭdo de tiu mia karesnomo fare de miaj kunuloj de la teamo ankaŭ lin atingis surprize. Sed la kono de la nomo devenas de alio. Dum la unua mondmilito germana

oficiro donis ĉi nomon al la avino de Elek, kiu tiutempe ankoraŭ estis fraŭlino. Tra la malfermita fenestro de la domo, iu oficiro – de la tie garnizonanta korpuso – ekaŭdis ŝian pianoludon. Tuj poste li faris honorigan viziton al la hungara familio kaj dum la soldatoj restis tie, li ofte vizitis la familion por aŭskulti la pianoludadon de la fraŭlino. De ĉi tiu fraŭlino, Katinka li ekkonis preskaŭ kvarcent kantojn de la hungara ciganmuzikisto kaj kantoverkisto Dankó Piŝta kaj ankaŭ aliajn hungarajn kantojn. El multaj kantoj la oficiro elektis unun kaj li ofte kantis ĝin kune kun Katinka. Ili estis ĉarmega paro, diris Elek kaj volis rakonti plu: „Ĉar mia avino havis belegan, sur ŝultron falantan blondan hararon, la oficiro...” „Ĉu li kantis kun ŝi la kanton: *Blondulineto ĉit, ĉit, ĉit?* – interrompis mi, - ĉu la sekva kanto estis tiu, kies tekston verkis Lajoŝ Póŝa kaj muzikon komponis Piŝta Dankó?” Mi ankaŭ tion sciis, ke tiu Ludoviko Póŝa vivis de 1850 ĝis 1914, estis verkisto, ĵurnalisto, aŭtoro de idiliaj poemoj kaj unu el la plej gravaj kantoteksto-verkistoj de la dudek jarcenta hungara literaturo. Liaj multaj kantoj muzikigite de Steĉjo Dankó vastaronde estis ŝatataj en la publiko. Dankó Piŝta hungara ciganprimaso, kiu muzikis ankaŭ en Rusio, vivis de 1858 ĝis 1903. Liaj pli ol kvarcent kantoj estas vaste konataj kaj ŝate ludataj de muzikistoj.

Póŝa, Lajoŝ – Dankó, Piŝta
Blondulineto....

Blondulinet', ĉit, ĉit, ĉit!
 Iomete ĉit, ĉit, ĉit!
 Rozburgono floras,
 Tri kisojn mi donas
 Ĉit, ĉit, ĉit (kolumbin')
 Ĉit, ĉit, ĉit!

Blondulinet' ĉit, ĉit, ĉit!
 Iomete flugu ni!
 Kondutu vin ĝuste
 kune enĉiele
 Ĉit, ĉit, ĉit (kolombin')
 Ĉit, ĉit, ĉit!

Per brilantaj okuloj aŭskultis Elek miajn vortojn, poste li demandis: „De kie vi scias Hanucika ĉion ĉi?”

Post mia nomo Hanna, sole li komencis nomi min Hanucika. Mi rakontis, ke en mia ĝisnuna vivo mi multfoje aŭdis ĝin kanti kaj klarigi de mia avo. Sed nun klariĝis por mi, ke de kie devenis la kantomemoraĵo de mia avo.

„Kaj vi, karulino, de kie scias paroli tiel bele hungare?”- demandis li plu. Mi konfesis, ke mi diligente vizitis la hungarajn lingvokursojn organizatajn de la Germa-Hungara Amika Societo. Tie mi sukcesis alproprigi la lingvon tiom grada, sed mi devus ekzerci ĝin pli multe. Pro tio estiĝis nia nova sekreto kaj mi tre ĝojis pro ĝi. Daŭre pliiĝis niaj malgrandaj komunaj memoraĵoj, kunligaĵoj inter ni. Kiam mi komencis iom frostotremi pro la malvarmo de la nokto, li malfermis la pordegon malantaŭ mi, buŝkisis, poste ebŝovetis min en la domon promesante adiaŭi de mi ĉe la trajno je nia forveturo hejmen.

Lia kiso jam ne atingis min malatende. Mi reciprokis ĝin plenĝoje. Je nia forveturo li preskaŭ malfruis. Jam mankis ankoraŭ unu minuto, kiam alvenis kurante kaj transdonis al mi malgrandan paketon.

„En ĝi estas porvojaĝa dolĉaĵo kaj unu letereto” – atentigis li min. En la paketo estis skribita lia peto por mia mano, krome lia konfeso pri tio, ke de sia avino ne nur la germana oficiro – mia avo -, sed ankaŭ li – la nepo de Katinka – ellernis same la lingvon Esperanto, kiel mi de mia avo.

Hejme unue mi ekmoligis mian avon. Pri tiu anonco, ke salutas lin nepo de Katinka el Hungarujo kaj mi volas edziniĝi kun li, lia spiro preskaŭ haltis. Mia avo preskaŭ mutiĝis pro la surprizo. Poste li rakontis, ke li ekamis tiun ĉarman hungaran fraŭlinon, sed ĉar lia patro postulis por li germanan edzinon, li ne regalis ŝin per promesoj. Sed, ĝis nun li ame rememoras pri ŝi, ŝiaj belaj pianoludoj kaj ŝiaj esperantolingvaj instruhoroj. Pli poste, kiam

mia patro deklaris, ke Elek estas ne nur perfekta fakulo, bona, ĝentila, honesta homo de la verito ĝis la plandoj, neniu jam kontraŭis nian decidon geedziĝi.

Nia ŝtata oficiala geedziĝa ceremonio okazis en Germanio. Dum la bankedo organizita post la ceremonio okazis, ke filineto de Elek ekvidante min kuris al mi, alŝovis mian sinon kaj kriis: „Patrineto mia, mi amas vin, restu kun ni!” Tiam ĉiujn sorĉis la ĝojo de la eta Anna. La germanian ceremonion kaj bankedon ne partoprenis nur Henri. Ĝus tiam li estis nomumita al universitata profesoro. Tial li ne povis vidi nian ĝojon kaj la grandiozan geedziĝan ceremonion, kio estis tiam vera sensacio. Ĝi estis organizate lastatage de la Tutgermana Esperanto- Kongreso. Tie, inter niaj gastoj estis ankaŭ multnombraj geesperantistoj. Esperanto-flagetojn svingante marŝis nia maĵoreta grupo kaj inter ilia spaliro marŝis mia fianĉo kun mi. Kiam finiĝis la oficiala ceremonio ene, ekstere ni devis denove diri la jeson ankaŭ antaŭ tiuj, kiuj jam ne povis havi lokon en la ceremoniĉambrego. Mia patro kaj avo farigis Esperanto-stelajn aerbalonojn. Kiam Elek kaj mi eldiris la jeson, ĉiu partoprenanto de la geedziĝceremonio delasis flugi la balonojn kaj ekrigardis al la ĉielo. La tuta ĉielo plenplenis per Esperanto-steloj! Kaj mem la urbestro gratulis nin Esperantlingve! Ni fieris, ĉar nun okazis unuafoje, ke la urbestro mem gvidis la geedziĝceremonion anstataŭ la matrikulisto kaj Esperantlingve parolis al la publiko. Inter multaj bonvolaj gratulantoj estis iu damo, kiu iome malbonvoleme notis: „Nu, mi estas scivola, kiam vi vekigis el ĉi stulta Esperanto-sonĝo!” Ni per ĝojbrilaj okuloj diris: „Certe tio okazos neniam, ĉar ĝi daŭros por eterne! Ni atingis jam niam belegpromesan teran paradizon pere de Esperanto! Sed tiun tempon ni nun ne konas: kiam vekigis la homaro, tiam rekonos ĉiujn bonflankojn de Esperanto?! Ni staras sur realisma grundo kaj ĉiam faros ĉion eblan por antaŭenigo de la lingvo Esperanto.” Poste okazis la komuna fotado. Sur la granda komuna foto ĉiu ridis surprizite, ĝoje, bonhumore. Alimaniere ne eblis, ĉar dume la papago de mia panjo komencis kriadi: *Esperanto venkos! Esperanto venkos!*

La sinjoro urbestro fermis kaj nian ceremonion kaj la Tutgermanan Esperanto-Kongreson:

„Jes, ni kredas: ESPERANTO VENKOS!”

La dume antaŭvenanta pastro aldiris siajn ben,- kaj finvortojn: Estu tiel! Amen.

Naturaj Katastrofoj en la Mondo

Ĉinio

Tutlanda funebro pro viktimoj de koto-ŝtona fluo en Zhouqu

La 15-an de aŭgusto por esprimi funebro al viktimoj de koto-ŝtona fluo en Zhouqu, okazis tutlanda funebro, dum kiu la nacia flago estis duonhisita en la tuta lando kaj ĉe ĉinaj ambasadorejoj kaj konsulejoj en fremdaj landoj kaj publika amuzado suspendiĝis. Tio estas la tria tutlanda funebro post la fortegaj tertremoj okazintaj en Wenchuan kaj Yushu. Hu Jintao kaj aliaj ŝtataj gvidantoj kune kun popolanoj de diversaj naciecoj kun profunda malĝojo funebriis pro viktimoj de la fortega koto-ŝtona fluo en Zhouqu.



Funebro en Zhouqu / Redaktoroj: Liu Sigong kaj Zhang Xiaotong/

Pakistano



Al nia retrevuo, la
pakistana: Luis Morago sendis la foton – de homrajta organizo - , je peto de sinjoro Jaiwaid
Eshan

Proksimume 14 milionojn da homoj atingas la inundoj en Pakistano, kiu nombro estas pli, ol la kuna nombro de la helponesuloj de 2004-jara cunamo detruiga laŭ la bordoj de la Hinda oceano, la 2005a Kasmira kaj de la 2010-jara tertremo de Haitio, komunikis lunde la UNO. Laŭ UNO, en Pakistano jam je 13,8 milionoj ni povas taksi la nombron de la helpbezonantoj mizeron suferantaj. Pli ol kvar milionoj da homoj iĝis senloĝejaj sekve de la pakistanaj torentoj – komunikis iu parolportanto de UNO, ĵaŭde. La katastrofo atingas du milionoj da homoj plie, ol la pli fruaj katastrofoj kune. Jusuf Raza Gilani kabinetestro diris lunde, ke: lia lando neniam estis en simila malfacila situacio (Laŭ la MTI=Hungara Informa Oficejo – Hungara Vikipedio: 09.08.2010a)

Geesperantistoj en Pakistano

Bona anonco estas, ke sinjoro Jaiwaid Eshan, - gvidanto de la geesperantistoj - vivas en Pakistano kaj kun siaj esperantistaj kunuloj li helpas ĉie kie ili povas, ja la helpodono kaj ankaŭ la akcepto de helpo estas homa rajto!

Sinjinorino Adrienne Pásztor

Ruslando

La nekutime varmega vetero kaŭzis en Rusio incendiojn de arbaroj kaj incendiojn de torfoj, kiuj kaŭzis smogon. Sekve de tio iĝis aero de Rusio sufoka. Oni dekretis eksterordinaran situacion en Ĉeljabinsko, en ĉirkaŭaĵo de Ozersko, kie funkcias unu el la plej granda nuklean materialon prilaboranta kaj storanta uzino de la lando – komunikis Julia Horváth, raportistino de Moskvo de la Hungara Novaĵagentejo. Pro la smogo 63 mil aviadlinioj ne povis ekiri de okcidenta parto de Rusio ekde pasinta ĵaŭdo – komunikis dum gazetara konferenco Aleksandro Frolov, gvidanto de la meteorologia instituto. Cetere laŭ Frolov ankoraŭ ne estis sama eksterordinara varmego en Moskvo dum mil jara historio de Rusio: „Ion similan ni ne registris, eĉ ankaŭ niaj prauloj ne spertis.”

Esperantigis László Pásztor

Slovakio

Ekstrema vetero kaj naturaj katastrofoj suferigis aliajn landojn de Eŭropo kaj Azio, ekz. ankaŭ la najbaran Slovakion, kie la damaĝo ĝis nun estas 10 milionoj de eŭroj.

Esperantigis László Pásztor

Helpodono

Mi esperas, ke kiuj volas interesiĝi pri la situacio post la katastrofo, tiuj povas interesiĝi ĉe esperantistaj organizaĵoj de la suferantaj landoj. Kiuj volas doni helpmonon, aŭ alian helpon, tiuj faru tion pere de helporganizaĵoj de propraj landoj. Pensu pri tio, ke infanaro, patrinaro atendas la helpon! Ankaŭ vi povus ĝoji al la helpo en sama situacio! Mi petas, ke ĉiuj helpu laŭ propraj eblecoj! Ne forgesu, ke ankaŭ la plej malgranda monsumo valoras tre multe! En Pakistanon ankaŭ vi mem povas sendi monhelpon per banka ĝiro. Se vi volas sendi monon, vi devas skribi bankan komision al la banka ĝiro. Sur ĝin, bonvolu noti la sekvajn datumojn: Pri la organizo, kiun vi helpos en sia laboro:

La malsanulejo estis fondita en 1886 kiel kliniko kaj en 1889 fariĝis ĝi malsanulejo .

La malsanulejo estas por nur virinoj kaj infanoj.

Nun ĝi prefere traktas senpage malsanajn viktimojn de inundoj en ejo de la malsanulejo.

Ankaŭ ĝi organizas medicinajn/kuracajn tendojn en iom gravaj lokoj/regionoj de la inundoj.

Kontaj sciindaĵoj:

1. Titolo de Konto: *Title of Account*: Women's Union Missionary Society, Women's Christian Hospital, Multan Cantt.

2. Nomo de Banko: *Name of Bank*: Allied Bank Limited

3. Branĉa Kodo: *Branch Code*: 0752 En vortoj: nulo-sep-kvin-du

4. Adreso de la Banko: *Address of Bank*: Abdali Road, Multan, Pakistan.

5. Valuto: *Currency*: USD: Usonaj Dolaroj

6. Konta Numero: *Account Number*: 02 - 088 - 0198-0

7. Swift-Kodo: *Swift Code*: A B P A P K K A MUL

Notu ankaŭ la fakton, ke vi sendis la monon kiel monhelpon por provizi la inundajn viktimojn.

Pri la supraj datumoj informis min sinjoroj Jaiwaid Eshan: delegito de UEA, kune kun sia klubo (Multana Esperanto-Rondo) prezidanto sinjoro Akram Rongha.”

Helpemuloj, bonvolu helpi! Fare de la menciita hospitalo, la monhelpo espereble vere la mizerulojn helpos!

Sinjorino Adrienne Pásztor delegito de UEA, en Miskolc, por Hungarujo

Korekto, aldono de datumoj

En nia retrevuo numera: Majo, pluraj misskriboj okazis en la artikolo pri Oradea. Mi, verkanto de la artikolo eraris, kiam mi ne kontrolis la ĝustecon de la ricevitaj informoj. Nun, sinjoro István Budaházy (el Oradea) estis afabla alvoki mian atenton pri la korektindaĵoj. Mi petas akcepti la sekvajn ĝustigajn tekstojn anstataŭ la eraraj aŭ ne tute kompletaj tekstoj::

/1a/... El Nagyszalonta (naskiĝejo de la hungara poeto Arany János/Johano Arany) alvenis la mezlerneja-profesoro, iama esperantisto Endre Danielisz, kie li estas elstara kaj renoma lokhistori-esploranta etnografo.

/1b/ Ankaŭ doktoro Lázár Gábor kuracisto estis gasto de la Esperanto-klubo de Nagyvárád (Oradea).

/2/ Sinjoro Budaházy ne konsentis pri la indikoj, pri la nombro de loĝantaro de la urbo, tial mi komunikas nun liajn datumojn menciante, ke miajn pli fruajn datumojn mi ricevis de la kredantoj de la dimanĉa kalvinana di-servo kaj de strataj irantaj venantaj homoj ekbabiladante kun mi: Jen, liaj indikoj: La urbo nun havas iom pli ol 200 000 loĝantojn, el kio ĉ. 27-30% estas la hungara. Pli frue ankoraŭ vivis tie 230 000 homoj, sed dum la lastaj jaroj, en la ekonomia krizo, pluraj dek miloj da homoj forlasis la urbon relokigante en la vilaĝojn.

/3a/ Laŭ sinjoro doktoro Budaházy, malĝustis miaj informoj ankaŭ pri reĝo Sankta László (Ladislao). Reĝo László la Sankta (1077-1095) nur translokigis la Episkopejon el vilaĝo Bihar en Várad, ĉ. 1090. Sankta László mortis en 1095. Laŭ la hungara Vikipedio: ”László-n la unuan, oni entombigis unue en Somogyvár, poste oni transportis lian kadavron – post la jaro 1113a – en Várad, kaj tie ĝi gajnis sian eternan ripozon. Lia tomboloko en Várad iĝis pilgrimejo miraklo-fara. Ĝis la komenco de la 15a jarcento, en la ĉefkatedralo oni gardis lian kapo-relikvotenan buston apud lia korno kaj batalhakilo, je kio ĵuris la partoprenantoj de la procesaj juĝoj kaj ĉefnobelaj ribelantoj.

/3b/ Laŭ la hungara Vikipedio mi povas rakonti, ke: „La unuan orumigitan rajdstatuon de Sankta László, la 20an de majo en 1390 antaŭ de la de li konstruigita ĉefkatedralo Virgulino Maria, oni starigis dum la ĉeesto de la reĝa geedza paro Maria kaj Sigismundo. La statuon preparis la fratoj Kolozsvári: Márton kaj György, je mendo de episkopo Czudar János. La kreaĵo neniigis dum la turkaj detruoj. Nun en Nagyvárád ankaŭ du skulptaĵoj gardas memoron

de St. László. El inter ili unu staras antaŭ la enirejo de la romkatolika katedralo. Ĝi estas plenstatua metala skulptaĵo, estas kreitaĵo de la budapeŝta skulptoartisto Tóth István. La alia relikvo-busto estas gardita en la katedralo, kune kun la kraniorelikvo (ili estas kreaĵoj de la oraĵistmajstro s-ro Link Fülöp el Budapeŝto). Ambaŭ verkojn oni preparis en 1892. Relikvo-buston oni gardas ankaŭ en Hungarujo, en baziliko de urbo Győr.

En Nagyvárad, en 1892 d-ro Schlauch Lőrinc – la tiama kardinalo de Várad – petis la budapeŝtan orumartiston por prepari unu admirindan buston, relikvo-buston pri reĝo St. László. La relikvo-busto pretiĝis, ĝin oni gardas ĝis niaj tagoj en la romkatolika katedralo de Várad, sed en la relikvo-busto oni gardas ankaŭ tiun malgrandan relikvejon, kio enhavas unu peceton de la kranioosto de reĝo László. En Nagyvárad ĉiujare oni aranĝas grandan festenon, procesion per la bustorelikvujo, al kiu alvenas ĉiam multe da pilgrimoj, rememorante pri reĝo László. La festo okazas ĉiam en la katedralo je la kvina dimanĉo post Pasko.

/4/ Laŭ la hungara Vikipedio: „Sur la Placo St. László staras rajdskulptaĵo de Vitéz Mihály (Mihai Viteazul), kion oni starigis en 1994. Mihail Viteazul batalis por estigo de la unueca rumana ŝtato. Pli frue staris tie soveta milita monumento, pli frue estis tie rajdskulptaĵo de rumana reĝo Ferdinando (1924), kaj bronza statuo de St. László (1893), kaj lia ŝtonskulptaĵo (1739).

/4/ Sinjoro Budaházy ne akceptis bona, ke mi esperantigis la baptonomojn de la famaj elstaraj homoj, kvankam la nomoj estis elektitaj el la vortaro. Do, la nomoj sen esperantigoj estas jenaj: Szent László, Tabéri Géza, Tóth István. La aŭtoroj de la antologio Holnap, (Morgaŭ) estis: Miklós Jutka, Emőd Tamás, Dutka Ákos, Babits Mihály, Juhász Gyula, Balázs Béla.

.Mi bedaŭras ke en nia maja revuo ne okazis tute ĝustamaniere la informdonoj. En la estonto je la ĝustecoj de la informoj, mi plie atentos.

Adrienne Sinjorino Pásztor

Pedagogo de Zooĝardeno

Mia nomo estas sinjorino Suzana Magi Takács, zoopedagogo de bestĝardeno kaj kulturparko de Miskolc. / iam ĉasejo/. Multe da homoj demandas min: Kiujn mi edukas, istruas ĝustedirante? La demando estas rajta, ja la „zoo” signifas kaj beston kaj bestĝardenon. Sed laŭ la ĝusta traduko la zoopedagogio signifas bestĝardenan instruadon, edukadon. Mi okupiĝas kun homoj, al kiuj mi klopodas prezenti mitaklojn de la naturo kaj kelkajn interesaĵojn de la faŭno kaj /aŭ alvokas la atenton pri ĝeneralaj problemoj, pri konservo de la kunvivo, pri ekspluatado de niaj energifontoj. La zoopedagogo havas ankaŭ plurspecajn laborojn: la iu havas rektan efikon, dume akompanas en la bestĝardeno infangrupojn, aŭ po somero aranĝas zoo- taghejmojn, sed donas ankaŭ riporton kaj al elevidstacioj kaj al gazetaro. La alia tasko de la zoopedagogo estas la elformo de la t.n. „fono”, kio aperas pli kaŝite, ol la antaŭaj, sed estas tre ege grava! Ĉi tion ni povas klarigi pli simple: Kion vidas iu vizitanto, dume enpaŝas en la bestĝardenon? Kiaj estas la vojoj, la puto, la elkurejoj, la informigaj tabuloj, la ludejaj ludiloj...ktp. Estas facila kompreni tion, ke „vidindaĵbildo” de la bestĝardeno multĉio forete influas krom la materialaj ebloj kaj la faka scio.... Kaj ankoraŭ multĉio, sed tio estas la plej grava, ke ĉu ni povis transdoni ian „mesaĝon” al nia gevizitantojn. Pro tio la zoopedagogio devas /devus/ havi funkcion,-evoluigan planojn de la bestĝardeno, formante unuescon inter la zoopedagogio kaj bestĝardeno. Bedaŭrinde ĉi tio estas en Hungarujo ankoraŭ nur songobildo.

Sed mi iĝis zoopedagogo laŭ tiu ĉi spirito. Potage mi batalas pro tiuj aferoj, kiuj ne plaĉas al

mi, ĝenas mian vivmanieron....Sed la ŝanĝo estas eterna.Kvankam malrapide, sed ŝanĝas la antaŭjugojn havanta fiksiĝanta vivmaniero, laŭ kio la mondo estas por ni kaj tiel ni pritaksas ĉion: ĉu tio estas malutilam aŭ utila por ni?... Ni devus ellerni por kunvivi kun Ĉio...De kiam mi kapablas rememori, min tre ege interesis la ekstera mondo, ĉefe la movantaj bestoj, estis tute egale, ke saltis kuris, glitis, grimpis. Nature mian koron kaj nian etan loĝejon plenigis felaj bestoj, elprovinde paciencon de miaj gepatroj kaj niaj genajbaroj. Mi estas dankema al miaj gepatroj pro la amo kaj permesis evoluigi mian intiman econ. Ĉi tiel mi decidis apud la bestkuracistscienca universitato. Miajn mezlernejajn studadojn mi finis en gimnazio Földes Ferenc” de Miskolc pri ĥemia fako, kiu kun ŝato alproprigis la konojn. En tiu tempo ŝanĝis mia imago, ĉar ne bestkuracisto, sed zoologo dezirus esti, kiu atentis la en ĝangalo vivantajn bestojn, nome studadas tuttage tiujn, kuŝadante sur iu kampo....Post abiturienta ekzameno mi daŭrigis miajn studojn en la bestkuracista universitato en Budapeŝto pri la aplikata zoologia fako. Mi toleris malfacila la grandurban vivon, estis pli malfacila, ol kuŝadi sur iu kampo, sed dum tio ĉi lerni multe kaj sekci kaj atenti en la mikroskopo la tranĉaĵojn....

Ekde mia infanaĝo mi iradis en la ĉasejon de Miskolc, kie kiel volontulino multfoje stumbladis ĉirkaŭ la bestoj, pro tio mi ĝojis. La bestĝardenoj ĉiam altiris min, sed multfoje la tie vidinditoj ne plaĉis al mi, kaj nek tio plaĉis al mi, kiel vivas tie la bestoj. Kiam mi devis specialiĝi en la universitato, estis memkomprenebla, ke mi elektis du fakdirektojn: zoologion kaj la ĉasbestbiologion. Kun mia elekto mi restis sole, sed ne bedaŭris tion. Akirante mian diplomon ni alfrontiĝis al tiu fakto, kiome malfacila estas por trovi laborejon kiel zoologo. Ĉar mi ŝatintus kuŝadi sur iu kampo atentante la bestojn, aŭ por fari iun saman en iu bestĝardeno. Ekde jaro 2004. mi laboras en bestĝardeno de Miskolc kaj nun en societo de infanoj atentis la bestojn, aŭ faras tion malofte sole....



Kampanjo „POR LA RABOBESTOJ DE EŬROPO” , Ni vivu kune!

EAZA – 2009-2010

Kial estas la Kampanjo la „Por rabobestoj de Eŭropo” ?

Dume la eŭropanoj meditas pri naturdefendo, pretaj por pensi pri ekzotikaj bestospecoj kaj foraj terenoj. Ni forgesas tion, ke ankaŭ en Eŭropo estas belegaj pejzaĝoj, kompleksaj biotopoj kaj karakteran, specialan, multĉion montranta ĉasbestaro, kiu bezonigas helpon. Ni ne konas nian propran naturan heredaĵon, kio estas komprenebla, ja apud niaj tagaj taskoj tiujn vidas malofte. Ni iras en lernejon, laborejoj kaj por aĉeti sur plenŝtopitaj vojoj, fervojoj. Ni iradas sur bele aranĝitaj terenoj, kiujn okupas domoj, industriaj kompleksaĵoj. Ni vidas homojn, dombestojn, birdojn, sed ne vidas, aŭ malofte vidas ĉasbestojn. Pro tio ni facile forgesadas, ke ĉirkaŭ ni ankoraŭ ekzistas la ĉasbestaro, eĉ tiu plimultiĝas. La ĉasbestoj havas kapablojn por transvivi, sed tio ne estas senfina, ĉar la ĉasbestoj tre ege malfacile vivas kaj ilia vivo estas

endanĝerigite. Efike de la homa agado, la vivlokoj de la ĉasbestoj ĉiam malpli kaj malpliigas kaj estos malpuraj. La rabobestoj tiun ĉi kompensante vivas sur nia tereno kaj estos niaj konkursantoj kaj eluzas „niajn energifontojn.” Rezulte de tio ni ne estimas, ne miras ilin, sed taksas tiujn kiel portantoj de infektoj kaj kaŭzantoj de damaĝoj. Ĉefe la eŭropaj grandaj rabobestoj estas en centro de niaj antaŭjugo. Pluse tiuj unue kaj rekte sentas multe da problemoj, kiel ekz. malpliigo de stoko de iliaj predobestoj, perdo de la vivlokoj, la mediopolucio kaj la troa utiligo. Tiu estas fakto, ke ili estas la kvalitaj trajtoj de nia ĉirkaŭaĵo kaj niaj intencoj. Eŭropo estas nia hejmo, pro tio konservo de la ĉasbestaro kaj vivlokoj estas unuevice nia respondeco. La rabobestoj estas gravaj partoj de la ĉirkaŭaĵo pro iliaj ekzistrajtoj kaj indikenzoroloj. Elstarajn estrospeciojn starigante en centro de la atento konsciigebla la graveco de la naturdefendo. Multe da rabobestoj / lupoj, urso, vulpo ktp./ estas konataj, facile rekoneblaj kaj estas taŭgaj por peri nian mesaĝon. Se ni formas tian ĉirkaŭaĵon, kie la rabobestoj plimultobliĝeblas, tiukaze la ĉirkaŭaĵo iĝos sana. Fine dum la pli fruaj kampanjoj ne provis efiki je agmaniero de homoj de aliaj kontinentoj por defendi endanĝerigitajn bestogrupojn, aŭ por konservi la unikajn biogeografiajn regionojn. Kiel ni povas konvinki en malproksimaj kontinentoj vivantaj homojn pri tio, ke ekzemple gravas la konservo de la tigo, rinocero, gorilo kaj pro tio ilo ŝanĝigu siajn vivmanierojn, se ni nenion kapablas fari por la panterlinko kaj por la eŭropa vizono? Ni ĉiuj devas konsciigi, ke la naturdefendo komenciĝas hejme.

Kunvivo kun la grandaj rabobestoj. Tasko kaj ebleco.

Dum la jarcentoj persekutitaj ursoj, lupoj, linkoj kaj musteloj nun revenas al la eŭropaj regionoj. Ĉu ili kapablas vivi kun ni? Ĉu ni kapablas vivi kun ili? Kial tio ĉi estas temo de disputoj? Kio estas la solvo?

Problemoj kaj solvoj

En Eŭropo la rabobestoj devas alfrontiĝi al du kontraŭaj problemoj: iuparte pliigas, aliparte malpliigas nombro de la individuoj. Samtempe la kampanjo „Ni vivu kune!” enhavas ambaŭ grupojn. La „Ni vivu kune!” signifas iuparte, ke ni faru ĉion en intereso de transvivo de la endanĝerigitaj rabobestoj, aliparte ni ellernu la kunvivon kun tiuj, kiuj tro plimultiĝas kaj envenas al niaj terenoj, kio rezultas konfliktojn. Ni bezonigas iun strategion, ke ĉeesto de la /granda/rabobestoj estu partoj de ĉiutagoj de nia vivo sur ĉi tiu plenŝtopita kontinento.

1. La grandaj rabobestoj, kiuj delonge ne ekzistis sur multe da okcidenteŭropaj vivlokoj, iom post iom okupas iamajn loĝlokojn. Nuntempe, dume okazis ŝanĝojn koncerne de la utiligon de bienoj, en Eŭropo la arbarkovriteco malpliigis, ol antaŭ multaj jaroj. Efike de tio nombro de kelkaj rabobestoj pliigis kelkloke, kiuj loĝatigis kelkajn teritoriojn, do plimultiĝis. Tiu fakto rezultigas tion, ke la sovaĝbestoj atingas terezojn de la homoj. Ĉi tio kaŭzeblas damaĝojn de la homoj /forrabo de la dombestoj/, konkuron por la energifontoj, la pacienco malpliigas pri la rabobestoj, eĉ okazeblas persekutadon de la rabobestoj. Sur ĉi tiuj terenoj la homoj devas ellerni la malnovajn teknikojn, kiujn aplikis la prauloj por defendi siajn dombestojn.

2. Nombro de aliaj rabobestoj forte malpliigis efike de la homa agado: perdo de la vivlokoj, mediopolucio, persekuto, konkursado kun la ne indigemaj specioj, aŭ domestigataj specioj. Pro tiuj malpliigas la nombro de la individuo. Ĉi tial bezonas la rekta interago al la transvivo. Pro ĉi tiuj problemoj estas bezonata ŝanĝigo de la homa pensado kaj konduto por helpi la kunvivon. /”Ni vivu kune!” / Eblas pensadi pri kompenso por la homoj pro la damaĝoj, kiujn kaŭzis la rabobestoj. Sed pli bona solvo estas la prevento de la damaĝoj. / ekz. per ŝafpelhundoj./ Iuj ĉasistoj havas koleron pri la rabobestoj, dirante, ili „malbonigas siajn ludojn.” Ĉi tiun koleron eblas mildigi, se ni aplikas ĝustan mastrumadon pri la ĉasbestoj. Estas grava ankaŭ la ĝusta mastrumado pri regiono, inkluzive renovigon de la vivlokoj kaj malhelpon de la malpliigon de la vivlokoj. Estas grava, ke ni certigu sufiĉan terenon por vivo de la rabobesto kaj al la disvastiĝo de tiuj. Do, estas esencaj la speciodefendo kaj la mastrumado pri ĉasbestoj. Ĉe kelkaj specioj estas nemalhavebla denove por plimultiĝi tiujn

por resti vivkapabla la populacio. Sed ĉe aliaj specioj estas necesa la kontrolo de la troita plimultiĝo. La naturajn valoraĵojn vizitantan turismon helpas la rabobestoj kiel reklamoj kaj ne eluzantoj de la lokaj ĉedomaj etbieno. La rabobestoj ofte ŝajnas kiel negativaj rolantoj / pensu pri historio de „Ruĝulineto kaj la lupoj“, kiuj vekigas antaŭjugon inter la homoj. Tiun ĉi koncepton povas mildigi iu bona instruada kaj sciencopopulariga kampanjo kaj helpas ŝajnigi la rabobestojn pli pozitive. Estas grava por konsciigi, ke la rabobestoj estas nemalhaveblaj partoj de la naturo, kiuj vivas en niaj tradicioj kaj kulturoj.

Eŭropaj /ankaŭ ne tioma/ malpuraj dekdu

Eŭropo estas hejmo de multe da malgrandaj kaj grandaj rabobestoj. Estas neebla inkluzivi en nian kampanjon ĉiujn. Pro tio ni elektis dekdu karismajn endanĝerigitajn speciojn kiel estroj.

„Malpuraj dekdu” de kampanjo de 2008/2009.	Elstarigitaj rabobestoj de baseno-Kárpát
Bruna urso-urso aretus	Bruna urso-urso aretus
Blanka urso-talaretos maritimus	Eŭropa griza lupoj-canis lupus
Eŭropa griza lupoj-canis lupus	Orŝakalo-Canis aureus
Orŝakalo-canis aureus	Ruĝa vulpo-vulpes vulpes
Arkta vulpo-alopex lagopus	Eŭropa linko-Lynx lynx
Eŭropa linko-Lynx lynx	Sovaĝkato- Felis silvestris
Panterlinko-lynx pardinus	Lutro-Lutra lutra
Sovaĝkato-Felis silvestris	†Eŭropa mustelo – Mustela lutreola
Gulo-Gulo gulo	Melo-Meles meles
Lutro-Lutra lutra	
Eŭropa mustelo Mustela lutreola	Putoro, mustelkato, martesoj, ermeno, mustelo
Tigroputoro-Vormela peregrina	

La kampanjo

Ĉi tiu kampanjo estas la unua tuta kampanjo de EAZA. Ĝi certigas ĝis nun senekzemplan eblecon por partoprenantoj de la kampanjo al la rekta landa naturdefendo. Kvankam la kampanjo pri temas rekte pri ĉiuj rabobestoj de naturdefendo de nia regiono, sed ne nur la anojn de la „malpuraj dekdu” ni priatentas, kiuj troveblas en niaj kolektaĵoj kaj konataj estas por niaj gevizitantoj. Ĉi tiel la kampanjo faciligas la kontakton inter EAZA /kampanjo por eŭropaj rabobestoj/ kaj bestokolektaĵoj. Ĉi tiel ĉi tiu kampanjo iĝas pli ĝenerala, ol la pli fruaj kampanjoj. Pro tio ni esperas pli grandan partoprenon, ol pli frue. Krome el inter anoj de la „Malpura dekdu” multe da anoj troveblas ankaŭ en pli malgrandaj kolektaĵoj. Ĉi tiu kampanjo kreas pli grandan ŝancon por kunlabori al la sama bestĝardenoj kadre de la kampanjo. Ĉi tio estas grava ne nur koncerne de disvastigo de la kampanjo, sed signifas kontakton kun la EAZA. Ĉi tiu kampanjo larĝiĝeblas trans agosfero de la kampanjo, pro tio la membroj de EAZA ne nur por kolekti donacaĵojn cele de naturdefendo, sed partoprenu ankaŭ en aliaj kontinentoj dum la naturdefenda laboro. La kampanjo certigas eblecon por fari propran naturdefendan iniciadon. Temo de kampanjo „Ni vivu kune” certigas, ke ni alvoku la atenton pri neceseco de defendo de la maloftaj kaj endanĝerigitaj specioj kaj atentigu ankaŭ pri tio, ke ĉiuj ĉi postulas iajn ŝanĝojn en nia ĉiu taga vivo.

Celoj de la kampanjo

1. Por konsciigi la homojn, ke la mondo, ke la mondo de la sovaĝbeŝtoj estas multkolora, kiu ankoraŭ ekzistas en nia patrujo kaj en la plenŝtopita Eŭropo. La homo konu, estimu tiun kaj

estu fieraj je tiu kaj oni volu defendi tion.

2. Por konsciigi tion, ke multe da grandaj rabobestspecoj, ĝiaj individuoj kaj terenoj pliiĝas kaj ni devas certigi lokon por tiuj.

3. Por konsciigi tion, ke nia vivmaniero, agado rezultigas malpliiĝon de la vivlokoj, malpurigadon kaj dispecetiĝon de la vivlokoj, pro kiuj estos duba estonto der la maloftaj kaj endanĝerigitaj rabobestoj.

4. Por komprenigi tion, ke ĉeestoj de la rabobestoj estas unu el la plej indikiloj de sano de nia ĉirkaŭaĵo.

5. Por instrui por membroj de EAZA kaj gevizitantoj, ke la naturdefendon devas apliki hejme, ne sur malproksimaj lokoj de la mondo, ja la defendo de la medio komenciĝas ĉe la homoj, kun sinteno kaj vivstilo de la homoj. Same al la aliaj EAZA-kampanjoj, ankaŭ la kampanjo „Por eŭropaj rabobestoj” celas kolekton de donacaĵoj por apogi diversajn naturdefendajn programojn. Ni elektis la programojn el la tuta Eŭropo kaj atingas multajn indiĝenajn rabobestspecojn. Ĉiuj elektitaj programoj ligiĝas al tematiko de kampanjo „Ni vivu kune”. Celo de la kampanjo „Por eŭropaj rabobestoj” por atingi, eĉ superu la 750 mil eŭrojn de la kampanjo „Por amfibioj.” Ni esperas, ke pliiĝos pretiĝo de EAZA rezulte de niaj fortostreĉoj. Laŭ niaj esperoj estiĝeblas daŭraj kontaktoj kun la eŭropaj naturdefendaj organizaĵoj kaj tiel ĉi la eŭropaj bestĝardenoj entreprenas daŭran rolon en la naturdefendo.

La eblecoj

Por multe da homoj la grandaj rabobestoj en la moderna Eŭropo tielŝajnas neakordigeblaj. Sed la kondiĉoj estas donitaj surloke. Populacioj de la kaptajbestoj – vulgara cervo, kapreolo, alko, apro – tre ege pliiĝis. La leĝoj aŭ donas tutan defendon al la rabobestoj, aŭ regalas mezuron kaj metodon de ilia legitima ĉaso. La grandaj rabobestoj pruvis, ke kapablas vivi en la de homoj elformita ĉirkaŭaĵo. Ni havas nekredeble multe da lokaj eblecoj por helpi iun solan provadon por por remeti la sovaĝbestojn en tiun transformitan pejzaĝon, kie ni vivas, laboras kaj ludas. Ĉu ni kuraĝas por vivi kun la eblecoj? Ĉu ni kapablas por defendi niajn sovaĝbestojn?

Sur Limo de la formorto

Antaŭ kvindek jaroj situacio de la eŭropaj grandaj rabobestoj ŝajnis esti en senespera situacio. Nombro de la rabobestoj ege malpliiĝis pro la homa persekuto kaj pro la transformo de la pejzaĝoj. Sur kelkaj lokoj de la kontinento la rabobestoj ankaŭ malaperis. Nur kelkaj populacioj restis sur la montaj regionoj kaj sur periferio de la kontinento. La loka formorto jam sentigis sian efikon....

Repostulo de la kontinento.

Trans la rekono la situacio ŝanĝiĝis. La lupoj denove loĝatigis la duoninsulon-Skandinavo, Germanion kaj Alpojn. La restaĵpopulacioj signife plimultobliĝis en duoninsulo-Iberio en Italio kaj en la Baltaj-ŝtatoj. La populacioj de la eŭrazia linko denove okupis siajn iamajn vivlokojn en la duoninsulo-Skandinavo, en la Baltaj-ŝtatoj kaj en la Karpatoj kaj oni reloĝigis tiujn en partojn de Alpoj kaj Mez-Eŭropo. La populacioj de la urso tre ege pliiĝis sur duoninsulo-Skandinavo, Balkanoj kaj Karpatoj. La guloj reiris sur sudajn terenojn de la duoninsulo-Skandinavo kaj enloĝigis la malalte situantajn arbarojn. Tielmaniere, ŝajnas, ke Eŭropo estiĝos malgranda por pluraj grandaj rabobestoj, ne kiel estis antaŭ duonjarcento.

1. Problemo kaj defio – Predo de la dombestoj

Bazo de la konfliktoj, dume la grandaj rabobestoj trovas ne garditajn dombestojn, rezulte de tio la dombestoj difektiĝas, aŭmortas. Feliĉas, ke tiuj konfliktoj estas mildiĝeblaj per diversaj teknikaj solvoj. La plej bona solvo estas por gardi la paŝtantajn dombestojn per elektra bestgardilo, aŭ la tradicia paŝtado kun akompanoj de paŝtisto kaj ŝafpelhundoj.

2. Problemo kaj defio - Konkursado kun ĉasisto

La grandaj rabobestoj kaj la ĉasistoj ĉasas saman kaptajon: vulgaran cervon, kapreolon, apron. La lupoj mortigeblas kelkfoje ankaŭ la ŝafpelhundojn. Tielŝajne estas neebla mildigi la konkursadon inter la rabobestoj kaj la ĉasistoj. La grandaj rabobestoj bezonigas la kaptajon en intereso de siaj transvivoj kaj devas konsideri, dume oni konstatas nombron de la elpafeblaj sovaĝbestoj. Kelkloke la ĉasistoj povas elpafi kelkajn grandajn rabobestojn „kiel kaptajoj.”

3. Problemo kaj defio – Pripensu grandstile

La grandaj rabobestoj bezonigas multe da lokoj. Kelkaj individuoj travagadas plur cent,-aŭ mil kvadratkilometran terenon. Tiuj ne priatentas la de homoj desegnitajn limojn kaj iradas libere sur mapo de Eŭropo. Ni bezonigas kunlaboron inter tiuj ŝtatoj en intereso de efika defendo de la grandaj rabobestoj, sur kies teritorio la populacio troveblas. Multe da terenoj „Natura 2000” estas grava rifuzejo en Eŭropo kaj multfoje bazteritorio estas. Sama estas grava priatenti la tutan pejzaĝon, kiu ĉi tiuj bazteritorioj troveblas.

4. Problemo kaj defio – Infrastrukturo

Eŭropo estas iu plenŝtopita kontinento. La restitaj naturaj vivlokoj etas dispecigite de la vojreto kaj loĝitaj terenoj. La grandaj rabobestoj rilate paciencaj kontraŭ la evoluigoj, sed la aŭtostradoj limigas ilian movon kaj kelkfoje mortigas ilin la veturiloj. Sur la dispecigitaj terenoj tiuj bestspecioj, kiuj bezonigas grandan terenon, ne ekrestos, / ekz. la grandaj rabobestoj./ Solvo eblas por uzi diversajn pontostrukturojn, ekz. verdajn pontojn, koridorojn kaj alte konstruitajn vojetapojn. Sur tiuj ĉi la bestoj povas transiĝi sekure.

1. Problemo kaj defio – Malgrandaj populacioj

Ne ĉiuj populacioj de granda rabobesto estas granda kaj kreskanta. En Eŭropo ĉi estas malgrandaj, izolitaj populacioj, kies postrestado estas duba. Ĉi tiaj populacioj estas ekz. la ursoj en Nord-Hispanio, en Pireneoj, en Alpoj, kaj en Mez-Italujo, aŭ la linkoj sur suda parto de dunoninsulo-Balkana. Ĉi tiuj populacioj nature havas krizositucion, pro tio oni devas malpliigi la ŝtelĉasadon kaj devas certigi la vivlokojn interese de la plimultobliĝo.

1. Problemo kaj defio – Antaŭjugo

La grandaj rabobestoj havis ĉiam konstantajn timon kaj koleron en nia kulturhistorio. Penso de ilia konservo estas noveca. Pri la rabobestoj ankoraŭ ekzistas antaŭjugo, kiuj esprimiĝas tiel, ke oni pereigas ilin neleĝe. Ĉi tiu problemo en tuta Eŭropo sur kelkaj terenoj danĝerigas la reston de la malgrandaj populacioj. Pro tio estas necesa por plani en la instruado, informado kaj en la leĝdonado la defendon de la grandaj rabobestoj. Pluse oni devas krei iun indan kaj

demokratana institucio-sistemon, kiu priatentas interesojn de la regionaj homoj, dume oni decidas pri estoj de la grandaj rabobestoj.

Fine....

Ni havas eblecon por krei iun novan eŭropan pejzaĝon, kie la sovaĝbestoj kaj la homoj povas vivi kune. Tio estas la plej granda defio por reteni nian propran homan naturon. Ĉu ni ellernas por toleri ĉi tiujn bestospeciojn? Ĉu ni kapablas kunvivi kun ili en samaj vivlokoj? Ĉu ni kapablas utiligi la samajn energifontojn? Ĉu ni povas venki super niaj jarcentaj antaŭjugo? Ĉu ni povas ŝanĝigi nian timon, ke ĝi iĝu estimo? La grandaj bestoj jam pruvis, ke kapablas kunvivi kun ni. Tio estas demando: Ĉu ni kapablas kunvivi kun ili? Ilia estonto tute dependas de la nia pacienco.

Motivoj por partopreni

Ĉi tiu kampanjo pritemas pri ni, pri nia kontinento, pri nia ĉirkaŭaĵo kaj pri nia sovaĝbestaro. Kiel ni povas motivi niajn gevizitantojn por defendi vivularon de la kontinentoj, se ni, kunlaborantoj de la bestĝardenoj ne kapablas inspiri niajn gevizitantojn por defendi siajn hejmojn? Ni kutimis diri ofte, ke celo de la modernaj bestĝardenoj estas la naturdefendo kaj la formado de la vivmaniero. Ĉi tiu kampanjo estas bonega ŝanco por demonstri nian efikecon pri ĉi tiuj taskoj kaj por ni mem kaj por niaj gevizitantoj. Ĉi tiel la gevizitantoj spertos nian influon. Ĉi tiu kampanjo estas pli rekta por la publiko, ol niaj pli fruaj kampanjoj. Pri ĉi tiu kampanjo informoj troveblaj en retpaĝo de la kampanjo:

www.carnivorecampaign.eu /sr-ino Suzana Magi Takács/

Jen unu, el la premiitaj fabeloj.
Pseŭdonimo: „Mi estas Lupo”

La Miskonita Lupo

Dum iu bela aŭtuna aŭroro granda paniko estiĝis en la arbaro. La sur rando de arbaro loĝantaj, ankoraŭ dormetantaj bestoj vekigis bojadoj de ĉashundoj.

- Ni rapide! Eskapu ni! Venas la ĉasistoj! – aŭdiĝis de ĉie atentigo de la birdoj.

La en arbaro loĝantoj, escepte de kelkaj, rapide klopodis por iri al la malproksima kampo.

- Kio okazis? – demandadis unu de alia timeme.

Dum la granda bruego la vulpo alparolis:

- Ne maltrankviliĝu! Oni serĉas ne nin, nur esploras spurojn de la lupo.

- Kial do? - demandis la urso surprizante. – Ĝi neniun suferigis.

- Sed jes! Nokte ŝafidoj malaperis el la ŝafaro. Certe ĝi ne estas ĉi tie pro tio, ĉar satiĝinte dormas en sia kuŝejo.

- Ne parolu frenezaĵojn, vulpokamarado! Ĝi ne elvenis el la arbaroj ekde jaroj. – silentigis la vulpon la urso.

- Tiukaze ni atentigu ĝin, ke savu sian vivon ĝis la ĉasistoj ne trovas ĝin!

- Mi rapide serĉas ĝin kaj informas – diris la la pigo kaj forflugis al la pinarbaro.
- Lupo, lupo! Kie vi kaŝiĝadas? – kriĉis la pigo dealte.
- Mi estas ĉi tie – eliĝis la lupo – kion vi volas de mi? – demandis grumbleme.
- Se vi ŝatas la vivon, tiukaze eskapu! La ĉasistoj kaj iliaj hundoj jam sekvas viajn spurojn. Ili kredas tion, ke vi ŝteladas la ŝafidojn el la ŝafaro. Se ili ektrovas, certe vi mortos.
- Ĉu mi rabadas la ŝafaron? Ankaŭ tion mi ne memoras, kiam mi manĝis lastfoje ŝafidviandon. – grumblis la lupo. Kvankam en la fabeloj de homoj ĉiam mi estas la satana lupo, sed ili ne devus suspekti tuj min. Sed mi tuj malkovras la verecon: kiu estas la vera ŝafidŝtelanto?

Ĝi ekiris tuj al la paŝtejo. Ĝ singarde kaŝiris al radikoj de la arbustoj ĉiam pli kaj pli proksimen. Ĝi malantaŭ si mem jam aŭdis bojadojn de la ĉashundoj kaj rapidajn paŝojn de la ĉasistoj. Atingante la randon de la arbaro, rimarkis ĝi iun hundaron. Ĝi kaŝiris apud la hundaron, ĉar volis aŭdi ekscititan parolon de la hundoj.

- Estis tre bongusta la hieraŭa festeno.
- Mi esperas, ke nek la hodiaŭa estos pli malbona – diris la vulpvizaĝa hundo.
- Tio dependas nur de ni – diris la plej granda. – Post sunsubiro, dume la ŝafisto dormetas, forlogas hundeton Bodri kaj tuj eblas predi.
- Kio estos, se oni ekkaptos nin? - demandis la plej eta.
- Ne maltrankviliĝu, Eta! Oni ankaŭ tion ne memoras, ke ni vivas. Se oni ŝatintus nin, tiam ne forpelintus el la vilaĝo ka ni ne estus vagantoj. – trankviligis Etan la pendorela.
- Vi pravas, mia amiko. Oni ne pensas tion, ke ni povas esti la ŝafidŝtelantoj. Tiukaze oni ĉiam krias: „Lupo.”

La lupo ne volis aŭdi alian. Ĝi ekiris tuja l la kampo por peti helpon de la aliaj bestoj. Ĝi rakontis tion, kion aŭdis sur la rando de la arbaro, pro tio neniu kontraŭis planon de la lupo. Ĝi pensis pri tio, ke helpe de la en arbaro loĝantoj ili kondukas sur erarvojon la ĉasistojn ĝis ne estos sunsubiro. Post malheliĝo ili logas la ĉasistojn al la paŝtejo por rigardi la tieajn okazintaĵojn.

Ili faris tiel ĉi. La lupo alvokis la atenton de la ĉasistoj sur sin mem, sed antaŭ tio postatingintus, la leporetoj, meloj, sciuroj, kapreoloj miksis la spurojn. Por ke neniu koleriĝu, ili komisiis por direkti la saĝan, maljunan urson.

- Dio portu ĉi tiun lupon! Tuj estos sunsubiro kaj ni ne kapablas por kapti ĝin! – koleriĝis la hundojn kondukanta ĉasisto.
- Vi pravas! – alparolis la alia – Ekde mateno post ĝia forkuro ni kaptas nur ĝian spuron kaj ankoraŭ vagadas libere. Nek hodiaŭ estos en sekuro la ŝafidoj.

Dume ili indignis, iu hundo denove sentis odorspuron kaj bojante ekkuregis al la paŝtejo kaj la ĉasistoj apenaŭ povis sekvi tiun. Baldaŭ ili atingis la randon de la arbaro kaj kuregis al la ŝafaro.

- Tamen estos kaptiĝo, mia kamarado! – kriigis iu,

- Vi pravas! Tiu ĉi jam ne ŝteladas plu.

Sed atingante al la ŝafidoj ambaŭ haltis abrupte pro la surprizo. Kvin malsataj, taŭzitaj hundoj gvatsekvis ĉirkaŭ la ŝafaro, la lupoj estis nenie. La hundoj jam ĉirkaŭprenis la plej junan ŝafidon, sed la ĉasistoj alvenis en taŭga tempo por malhelpi la pli novan ŝteladon. Ili ne hezitis. Helpe de iliaj hundoj baldaŭe ekkaptis la vagantajn hundojn. Jam tiujn la ĉasistoj kondukis per kondukilo, kiam iu ĉasisto alparolis:

- Ja ĉi tiuj hundoj forfuĝis el nia vizaĝo! La malsato devigis ĉi tiujn por ŝteli ŝafidon. Kaj ni suspektis la lupon.
- Laŭ tiuj ni miskonis la lupon – alparolis la alia.

Ĉi tiujn okazintaĵojn la lupoj kaj ĝiaj amikoj atentis de la rando de la arbaro. Dume la ĉasistoj ekiris hejmen, la lupoj dankis la helpon kaj post la transvivitaj ekscititoj ĉiuj iris por ripozi.

Esperantigis László Pásztor

Ŝercoj

La konvinkiĝo

S-ro Kovács perdis sian edzinon dum la foiro. Kien ajn li iris, nenie trovis ŝin. Subite li rememoris iun savan ideon. Li rapidas al iu belega, juna vendistino.

- Fraŭlino, mi petas vin por flirtu kun mi iomete! Tiokaze mia edzino certe aperas!

Dialogo en viandovendejo

- Mi petas unu kg-on de kapviandoj!
- Tiun ni ne havas.
- Kaj unu kg-on de tripoj?
- Ĝi elĉerpiĝis.
- Mi petas du kg-ojn da ripviandoj!
- Bedaŭrinde nek tiun ni havas.

Poste la Ĉefo alparolas el la vartenejo:

- Mia Joĉjo! Kiu estas, kiu ĉi tiome elektema estas?

Esperantigis László Pásztor

Internacia leterkesto

Brazilo

Ni ricevis informon el Brazilio, pri prelego pri muziko. Je miaj demandoj, mi ricevis la malsupran leteron. Jen:

„Kara s-ino Adri,

Elkorajn salutojn!

Pere de mia amiko Aloísio Sartorato, mi informiĝis pri via aktiveco kiel ĵurnalistino, kaj estis granda ĝojo por mi, via intereso pri mia prelego ĉe Kultura Kooperativo de Esperantistoj, sed bedaŭrinde nenio por skribi ĉar la tuta prelego temis nur pri elmontro de la muziko, mia interveno estis precipe kolekti la filmajn prezentojn de muzikoj laŭ regiona kutimo, iom da folklorajdancoj, muzikaj regionaj formoj, kaj prezento de mapoj, montrante la lokigon de specialaj formoj. Ekzemple en ĉiu loko de Kolombio la muziko, kiun ni povas diri, estas vera Kolombia reprezentanto de muzika formo, estas "Bambuco" (bambuko). Ili havas tre delikatajn regionajn nuancojn sed Bambukoj. Ekzistas bambukoj por esti kantaj kaj aliaj nur por esti ludata, precipe de tipaj instrumentoj kiel "tiple" (variaĵo de gitaro) kaj "bandola" (variaĵo de mandolino) la variaĵo de tiuj du instrumentoj, estas precipe en la kvanto da kordoj kaj ĝia distribuo. Pri la formo, neniu grava klarigo, kvankam estos multe por diri, sed temis por distra prelego, ne por instrui muzikistojn, nek por analizi la formojn laŭ ritma konsisto, kiu inter alie estas tre kompleca.

Do, bedaŭrinde nenio por prezenti skribe, miaj klarigoj estis pri la filmoj prezentitaj, tre simplaj, du, tri vortoj, pri la formo kaj loko kie ĝi reprezentas.

Kore via Alfredo Aragón”

Volumo de profesoro Jozias Barboza

S-ro Ulisses Riedel, estro de “Unio Planeda”, institucio kiu bele apogas la Esperantomovadon en Brasília, invitis por lanĉo de la dua volumo de la lernolibro “Esperanto por Lernejoj Klasoj”, je la 19-a de junio 2010 Ĉi tiun verkon, kies aŭtoro estas Prof-o Josias Barboza, kuneldonis Brazila Esperanto-Ligo. Fakuloj rekonas ĝian altan valoron. Kontaktu la aŭtoron:

jofobo@hotmail.com

/Informis: psviana@terra.com.br

Gravaj Informoj el “BONA ESPERO”

Sinjoro G. Grattapaglia, estro de la konata institucio “Bona Espero”, en ŝtato Goiás, sendis al ni la jenan informon:

BONA ESPERO: idealo kaj realo” estas la titolo de la libro, lanĉita dum la Universala Kongreso de UEA en Roterdamo, kiu pritraktas la historion de 50 jaroj de tiu bien-lernejo en Alto Paraiso de Goiás. La libro vekis favorajn recenzojn en pluraj esperantistaj periodaĵoj inter kiuj reliefiĝas tiu en “Ondo de Esperanto”. La recenzisto Zbigniew Galor tiel konkludas: “*Bona Espero: idealo kaj realo, ne eniras en la purajn modelojn de libro jubilea, historia, dokumenta, vojaĝa k.s. La leganto trovos en la publikaĵo kunekziston de ĉiuj fadenoj: jubilea, dokumenta, historia, k.a. Pro sia bona valoro la verko de Roman Dobrzynski devas esti deviga legaĵo por ĉiuj, kiuj interesiĝas ankaŭ pri sociologio de Esperantaj lingvo kaj movado.*” En la ĉapitro :”Volontuloj de bona volo”, Dobrzynski pritraktis la epizodojn de dekoj da volontuloj elektitaj inter la centoj, kiuj kunlaboris en la bien-lernejo dum jaroj. Sen ili Bona Espero ne estus atinginta sian kvindekjaran jubileon en la konstanta plenumo de siaj statutaj celoj sociaj, agrikulturaj kaj esperantaj. Ankaŭ dum la lastaj monatoj Bona Espero gastigis volontulojn el Italio, Francio, Germanio kaj Pollando. Nuntempe voluntulas en Bona Espero la argentina kantaŭtoro Alejandro Cossavella, kiu instruas Esperanton, laboras en la kampo kaj kantas kun la infanoj. Krome, kunlaboras la usona esperantista verkistino Ester Schor el la Universitato Princeton, kiu skribas libron pri la esperantomovado por la usona

publiko, komisiite de sia universitato. La libro "Bona Espero: idealo kaj realo", ilustrita per naŭdeko da fotoj pri la multfacetaj aspektoj de la vivo en la bien-lernejo, estas aĉetebla en la Brazila Ligo. Laste oni informis nin ke per iniciato de kelkaj eks-volontuloj de Bona Espero, oni eldonis la version de la libro en Braille por blindaj legantoj.

La Amo

Akceptu en vian koron ĉi tiujn vortojn de la edukanto Paiva Netto, per kiuj ni Vin salutas:
Atenton!

"Amo estas la plej granda povo ekzistanta, la plej efika strategio por plibonigi la mondon. Ĝi povas montriĝi laŭ plej diversaj aspektoj: Solidareco, Frateco, Kompatio; ĝi tamen plu unikas kiel rimedo por efektive unuigi la popolojn kaj permesi ilin postvivi. Kiu plu vivos, tiu vidos!".

Karaj gesamideanoj,

Ni, el Legio de Bona Volo (LBV), plezure invitas Vin por partopreni tre gravan eventon, kiu celas al starigo de okazoj por dialogo, por socia interveno, por arto kaj kulturo, kun Ekumena Spiritualeco direktata al la ĉiuj personoj, nome la **Internacia Forumo de la Agema Gejunularo de la Bona Volo de Dio**.

En 2010, jam sub la 35a jareldono, tiu evento prezentas la temon sporto per la slogano: *"Bona Volo, la podio por ĉiaj fervorularoj!"*. Ĝi estas konstanta, per agadoj dum la tuta jaro, kaj disvolvas vivkvaliton kaj sporton kiel iniciatanton de Kulturo de Paco, pere de ĝiaj protagonistoj - gejunuloj el ĉiaj aĝoj.

Per tiu iniciato oni celas promocii la infanĵunulan iniciatemon kaj spertigi la komprenon pri kulturo kiel esenca ilo por konstruo de ia identeco. Ĝi estas ankaŭ efika rimedo cele al promocio de la Ekumena Frateco.

La evento okazis la **3an de julio (sabate)**, en la Ekumenaj Preĝejoj de la Religio de Dio tra la mondo, per la parolo de la ĉefgvidanto de la Agantaro de Bona Volo, Paiva Netto, kiu kronos la Forumon.

Vi estas nia speciala invitato. Akompanu kompletan raporton per LBV-retejo www.bonavolo.com kaj sendu al ni mesaĝon kun via komentario pri ĉi tiu Forumo aranĝita de Legio de Bona Volo.

Kun frataj salutoj, el San-Paŭlo, Brazilo,

Maria Aparecida da Silva

Respondeculino de la Departemento pri Esperanto de LBV

Ĉehujo

Vortoj de Tomáš Baťa, ĉeĥa sukcesa ŝuindustriisto, pioniera kapitalisto, el la jaro 1932

Tio, kion oni nomas kutime ekonomia krizo, estas alia nomo por morala mizero. Morala mizero estas kialo, ekonomia bankroto estas sekvo. En nia lando multaj homoj opinias, ke ekonomian krizon oni povas sanigi per mono. Mi timas la postsekvon de tiu eraro. Ni nun bezonas neniajn geniajn turniĝojn kaj kombinaĵojn. Ni bezonas moralan starpunkton al homoj, al laboro kaj publika posedaĵo. Ne subteni bankrotulojn, ne aranĝi ŝuldojn, ne malŝpari valoraĵojn kontraŭ nenio, ne ĉantaĝigi laborantojn, ni faru tion, kion nin levis el postmilita mizero.

Labori kaj ŝpari kaj taksu laboron kaj ŝparadon pli prosperajn kaj volantajn, pli honorajn kontraŭ pigrado kaj disipo.

Vi pravas, oni devas superi krizon de fido. Sed per teknikaj manipuladoj financaj tion oni ne povas. La fido estas persona eco kaj fidon oni povas krei nur per morala starpunkto kaj per persona ekzemplo.

Oni ne bezonas ion aldoni...

Legendo pri fino de paganoj en la regiono Mladá Boleslav

Lastaj paganoj en Bohemio vivis en slavaj setlejoj Březovice kaj Skalsko. En tuta lando dum tempo de Sankta Venceslao rapide disvastiĝis kristanismo. Sed en la regiono de Boleslav homoj ne volis rezigni pri siaj dioj kaj superstiĉoj. Pagana komunumo plifortiĝadis per pelataj paganoj el sudo, okcidento kaj nordo de Bohemio. Paganoj komencis persekuti novajn konfesantojn de kristana kredo. Kiam montiriĝis vane strebo venki ilian paganecon per forto de kredo, la praga princo Boleslav la Dua, nomita Pia, intervenis milite.

Militaj trupoj el vilaĝoj Hrušov, Předměřice, Kovář kaj Kluky en sangaj bataloj finfine dispelis la travivantajn paganojn al proksimaj arbaroj laŭ la rivero Jizera.

Post la forpelo de ĉiuj paganoj el la regiono ordonis la princo, por timigi ĉiujn malamikojn de kristanismo, konstrui fortan burĝon ĉe kunfluo de rivereto Klenice kaj rivero Jizera. Ĝi estis nomita Boleslavo Juna, ĉar sude jam staris urbo Boleslavo – loko, kie estis mortigita princo Sankta Venceslao fare de patro de princo Boleslavo la Dua Pia. La patro de Boleslavo la Dua estis Boleslavo la Unua nomita Terura, pli juna frato de princo Sankta Venceslao – patrono de bohemia lando.

Legendo pri fera bastono

Foje diablo volis prirabi rabistojn, sed la banditoj defendis sin kaj forpelis lin. Matene la rabistoj trovis bastonon kun surskribo: „Kiu la bastonon levos, tiu estos feliĉa.“ La bastono mem trifoje batadis teron en la loko, kie estis kaŝita iu trezoro.

La rabistoj fine estis kaptitaj, enkarcerigitaj kaj la bastono konservita en proksima burĝo „Dražice“.

Homoj kredis, ke la diablo nokte venadas, prenas la bastonon kaj en infero per ĝi torturas pekintajn animojn.

Legendo la pri fama loka rabisto Václav Babinský

Václav Babinský naskiĝis en la jaro 1796 en la urbo Litoměřice. Lia aventurema karaktero venigis lin al libervola militservo. Li enamiĝis al malriĉa Liduška kaj por ŝi unuan fojon li ŝtelis armean kason. Post drama epizodo kaj frua morto de Liduška, Babinský kun amiko Lojza Hofman kaj komune kun fratino de Lojza fondis rabistan bandon. Al la bando venis dizertintaj soldatoj kaj aliaj aventuremuloj.

Babinský fariĝis la plej fama ĉeĥa rabisto, pri kiu oni legis en ĉeĥaj kaj germanaj ĵurnaloj. Li regis en regionoj de la urboj Litoměřice, Mělník, Bezděz, Mladá Boleslav eĉ alie. La fino de lia rabista kariero okazis per perfido de unu el liaj amatinoj en la jaro 1835. Survoje al Mladá Boleslav li mortigis germanan komerciston, poste li intencis fuĝi al Germanio, sed li estis kaptita. La tribunala proceso daŭris preskaŭ kvin jarojn, dum kiu la rabisto provis kelkfoje fuĝi, sed sensukcese. En majo 1841 li estis kondamnita por 20 jaroj en

severan karceron en urbo Brno - Špilberk. Post pasigo de la puno li vivis reston de sia vivo en la monaĥinejo en Řepy kiel ĝardenisto, tre ŝatata de monaĥinoj. Li mortis en la jaro 1879.

Legendo pri boleslava buĉisto

Estis post malfeliĉa batalo sur „Blanka monto – Bílá Hora“ en la jaro 1621. El Prago haste fuĝadis trupoj de la reĝo Friedrich el Palatinato por savi sin el Ĉeĥio.

La plej ĉefa kortestrino de la reĝino Elizabeth Stuart, sinjorino el Reitzenstein vojaĝis al Saksio tra Mladá Boleslav kun sia akompanaro. La urbo estis plena de fuĝanta soldataro kaj homoj kaj tial ne eblis trovi por la germana nobelino eĉ la plej modestan lokon por ripozi kaj tranokti. Ŝi senkonsile vagis tra timoplena urbo ĝis ŝi eksciis de iu gastejmastro pri iu privata domo, kiu ne estas loĝata, sed en kiu de tempo al tempo fantomumas kaj neniu kuraĝas tie tranokti. La novembra vetero ne estis favora kaj la saĝa kaj pia sinjorino el Reitzenstein decidis en la mistera domo enloĝiĝi kaj spiritojn superigi. La forlasita domo estis eksposedaĵo de la loka buĉisto, kiu antaŭ nelonge vidviĝis kaj nun li havas novan fianĉinon.

La sinjorino loĝiĝis kun siaj servistinoj en iama dormoĉambro de la buĉisto. Ŝi ordonis bruligi multe da kandeloj kaj kantante piajn kantojn ŝi atendis horon de la spiritoj. Kiam batis la 11-a horo, kun bruo malfermiĝis pordo de apuda ĉambrego kaj al timigitaj virinoj proksimiĝis virina staturo kun bandaĵita kapo. La sinjorino kun tremanta voĉo demandis: „Kiu vi estas kaj kion vi deziras?“ La fantomo respondis: „Mi estas posedantino de tiu ĉi domo. Mi sukcesis nek per junaĝo, nek per beleco, nek per riĉeco alligi koron de mia edzo. Li amas alian virinon, kaj li volas edziĝi al ŝi. Min li sekrete mortigis per buĉista hakilo. Al la homoj li diris, ke mi ĵetis min el fenestro, ke mi mem mortigis min. Mi estis entombigita kaj neniu scias pri la krimo.“

Poste la fantomo prenis de la sinjorino oran ringon, demetis la bandaĵon el kapo kaj enmetis la ringon en vundon. Ankoraŭ diris: „Malfermu mian tombon, tie vi trovos la ringon“.

Frumatene la sinjorino postulis sekretan pridemandon ĉe urbestro kaj skabenoj de la urbo. Ili komence ne volis kredi la rakonton, ĉar riĉa buĉisto estis unu el la plej estimataj boleslavaj loĝantoj. Tamen post insistado oni ordonis la tombon de la malfeliĉa viktimo malfermi kaj esplori.

Kaj vere, al mirego de ĉiuj, estis en la profunda vundo de la kapo trovita la belega ringo kun signo de la sinjorino el Reitzenstein.

Poste oni agis senprokraste. La buĉisto estis kaptita survoje al preĝejo kun sia fianĉino, antaŭ okuloj de edziĝfestaj gastoj kaj muzikistoj. La kulpulo unue mensogis, sed ne longe. La urbestro ordonis alporti ĉerkon kun mortita virino kaj buĉisto falis senkonscie teren.

Laŭ la aŭtoro Ferdinand Strojček.

(Sendinto estas: sinjorino Jindřiška Drahotová)

Germanujo

Jaspers „La grandaj filozofoj - Kant“ pp. 486-487

La Feliĉo

„Esti feliĉe estas necese la deziro de ĉiu racia sed limita estaĵo, kaj pro tio neevitebla celo de sia dezirkapablo“, diris Kant kaj aliaj moralistoj.

Ĉar Ĉiu finita estaĵo volas esti feliĉa - sensencas postuli tiun deziron. Ĝi ekzistas ja. „Sed kio estas tiu feliĉo? La nocio ŝajnas klara“. Feliĉo estas „la kontentigo de ĉiuj niaj emoj laŭ ilia diverseco, grado kaj daŭrado. Ĝi estas „la stato de racia estaĵo en la mondo, en kiu ĉio okazas laŭ deziro kaj volo. Sed evidentas, ke tiu nocio fiaskas antaŭ malebleco, kvankam ĉiu homo volas atingi ĝin“, ĉar ĝi estas tiamaniera, ke neniu povas diri certe tion, kion li efektive volas deziri“.

Tion videbligas la jenaj kaŭzoj:

1. Ĉiuj elementoj de la feliĉo devas esti spertitaj. La sperto devas instrui al ĉiu pere de sia sento de plezuro kaj malplezuro, en kio li trovas sian feliĉon. Tiu sperto malsamas ĉe la homoj kaj ĉe la sama homo en malsamaj tempoj kaj estas nefinebla. Sed samtempe unu absoluta „ĉio“ kaj maksimumo de la bonfarto en mia nuna kaj estonta stato apartenas al la ideo de la feliĉo. La kontraŭdiro inter la malfinebleco kaj la sperto kaj ideo de la perfekteco de la feliĉo en la tempo ne estas solvebla.
 2. La ideo de maksimuma feliĉo ne eblas. Ĉar la sumo de la feliĉo ne estas taksebla pro tio ke nur analogaj sentadoj povas esti sumigitaj, sed la sentado tre diversas en la komplikitaj statoj de la vivo laŭ la diverseco de la emocioj.
 3. La homa naturo nenie povas esti satigita „en la posedo kaj ĝuo“. Ĉar la inklinoj ŝanĝas, kreskas kun ĝia plenumo (realigo) kaj „postlasas ĉiam pli grandan malplenenon ol oni intencis plenumi“.
 4. La feliĉo ne estas simple plezuro aŭ malplezuro, sed ĉi tiuj nur reflektinte estigas feliĉon aŭ malfeliĉon. Oni estas feliĉa aŭ mizera laŭ nocioj, kiujn oni havas pri ili. Feliĉo kaj mizero ne estas statoj sentitaj sed nur bazitaj sur reflektadoj. La homo imagas la ideon de stato nome pere de sia imago-povo kaj racio tiom diversmaniere, ke oni ne trovas en la naturo ĝeneralan definitan leĝon, kiu akordus kun tia ŝanceliĝanta nocio. Pro tio finita estaĵoj, kvankam estus la plej klarvidanta kaj povanta, **ne povas imagi tion, kion li ajn volas**“.
- Esperantigis C. W.

Hungarujo

IJL sukcesa kaj daŭrigota

La unua Internacia Junulara Lingvo-tendaro (IJL) okazis 11-18 de julio en Jászberény, Hungario.

En mateno de lundo je la 6-a kaj 30 minutoj je ĉies surprizo eksonis la konata kanto „Gumaj ursetoj“ – kiu preskaŭ fariĝis „himno de tendaro“ - kun regula fajfado. La fajfado estis en buŝo de Johano Nagy, kiu tiamaniere invitis ĉiujn por gimnastiki. Unuafoje li ne rikoltis grandan sukceson, sed ekde mardo la matena gimnastiko iĝis nepra programero de la tagkomenco. Post la bongusta kaj abunda matenmanĝo ekis la instruado, praktikado de Esperanto en du niveloj. Teresa Kapista el Serbio gvidis la lernemulojn, kiuj komencis penetri en misterojn de la internacia lingvo.

Bedaŭrinde Stanisław Mandrak el Pollando ne povis veni kaj nia prezidanto Imre Szabó anstataŭis lin. Li kolektis la scisuĉemulojn ĉirkaŭ si, kaj poluris la lingvoscion de la progresantoj en ekstera konversaciejo.

La antaŭtagmezoj daŭris simile dum la tuta semajno. Dum la posttagmezoj ni ekskursis ofte. Ni vizitis la Best- kaj Botanikĝardenon, la urbon Jászberény, la muzeon Jász. La troa varmo instigis nin plonĝi en la malvarmetan akvon de eksterurba strando.

Ĉiuvespere la interesaj interparoladoj, karaokeoj, rostado de lardo metis la kronon sur la tagon.

Vendrede vespere la tempo reiris al la 1970-aj jaroj. Rok-bando muzikis, laŭepoke vestitaj

dancistoj dancis. La etoso obsedis ĉiujn, ne ekzistis piedoj, kiuj povus resti surloke.
La 2a IJL okazos 3 -10 de julio 2011 en Jászberény, Hungario.
Legu pli rete: <http://eszperanto.t-online.hu>

Ferenc Harnyos

/Fonto: La Ondo de Esperanto (192) [/html]/ Sendinto: Hungarlanda Esperanto-Asocio/
Italio – Aŭstralio



Triesta Esperanto-Asocio



**lanĉas
la 4^{an} Internacian Konkurson - jaro 2010
pri la temo:**

Kristnaska Poezio

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la 15^a de novembro 2010, siajn verkojn al la jena adreso:

**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Via del Coroneo 15—IT-34133 TRIESTE—Italia**

Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aŭ pli da faritaĵoj laŭ la kategorio:

Kat. 1) Desegnaĵo (ekz: "kiel mi imagas tiun tradician feston", "la Kristnaska Kripo", "familia festo");

Kat. 2) Rakonto aŭ poeziaĵo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aŭ poeziaĵo pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ...);

Kat. 3) Manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al **Kat. 2)** aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

La "rakonto" aŭ "poeziaĵo" estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

- * persona kaj familia nomoj;
- * malgranda foto de la aŭtor/in/o;
- * aĝo;
- * lernejo kaj klaso;
- * poŝta adreso.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2010.

La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj [C]) en kadre de publika ceremonio en Trieste.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.it

Sendintoj estis: Elda Doerfler - Sandor Monostori

Italio

„Bluĉiela Mongolio”

Mongolio. Lando de Hunoj. La mita Ĉinggis-Khaano. S e n f i n o . Ŝamanismo .Nomadoj. Geroj. Ĉevaloj. Prerioj... La nulo kaj la tuto! Kaj super ĉio la bluo de la ĉielo kaj la nepriskribebila ruĝo de la malleviĝanta suno. Ima g o j k a j f a n t a z i o intermiksiĝas, iel oni klopodas ne lasi sin influi de tio spektita televide aŭ legita en libroj: mem oni deziras sperti, mem tuŝi per mano, mem oni volas droni en la senfino por povi fine aserti, ke, iel kaj iom, oni sukcesis aliri al pasinteco kaj estanteco de mongoloj! La rigardo flugas foren, ĉiam pli foren, sed tiu foro ne havas limojn. Vi staras, rigardas ĉirkaŭen, ĉirkaŭ vi mem vi turniĝas, 360-grade, kaj... verdo, montetoj, rokoj, herboj, padoj... Tie malproksime aro da galopantaj ĉevaloj... Kies ili estas? Nenies! Liberaj ili kuras laŭ la ventoblovoj, malaperas, sed kien? La prerio estas senfina, la okuloj, ne alkitimitaj al tiuj distancoj, ne plu kapablas sekvi ilin... Kaj jen, el nenio, aperas en ĉielo aglo, blankkapa: per malrapidaj, silentaj rondiroj laŭ la fluo de la vento ĝi sekvas ion — ĉu muson, ĉu birdon? - tien, tien al la malproksimo. Sablo, dunoj, etaj spuroj fosetas la flavetan surfacon... Jen truo, pli granda, tiu, pli malgranda... Kiu tie sin kaŝas? Herboj, altaj, sekaj, malmole dornaj... floroj flavaj, ruĝaj, bluaj buntigas la ondumantajn montetojn. Kranio, pure blanka, ĉirkaŭe kelkaj ostoj: restaĵoj de mortinta ĉevalo. Vivo kaj morto harmonie kunestas en la grandioza naturo: tia vido donas ne impreson malagraban, tio estas nura aspekto de la normalo, de tio kio normalas en la vivo de ĉiu kreitaĵo. *Ovoo* sur altaĵeto: kio ĝi estas? Kion ĝi signifas? Ofero al la diaĵoj: ankaŭ vi sekvu la riton. Ĉirkaŭiru ĝin trifoje, laŭ la horloĝmontrila direkto, esprimu deziron, surmetu plian ŝtonon aŭ bluan skarpon, simbolon de la ĉielo... Ĉu aspekto de ŝamanismo aŭ de budhismo? Oni ne komprenas entute, tamen tiuj tumuloj, konkretaj atestoj de religiemo de mongoloj, ĉiam naskas senton tre respektaman. Ĉiam pli foren, laŭ pasejoj apenaŭ rimarkeblaj, sekvante la spurojn de nomadaj ĉaroj, traŭrante fundon de senakvaj riveroj: atentu, kavaĵoj, ĉu renversiĝos la aŭto? Ne timu: sperta ŝoforo tre bone konas tiun grundon, estu certa ke oni atingos la celon en gloro! Piede de monteto, blankaj geroj: unu, du, ne tiom pli. Kaj apude, la ferĉevalo, la motorciklo, aŭ japan-fabrika ĵipo; malantaŭe, kamelo. Arego da ŝafoj paŝtas trankvile, zorge kontrolita de juna ĉeval-rajdanto. Fojfoje, subite, transiro de la spurvojo: atentu la ŝafidojn, ili ankoraŭ ne scias kiom danĝeraj povas esti aŭtomobiloj! Suno, arda suno bruligas haŭton kaj kapon. Kie ombro? Nenie! Kiel sin ŝirmi? Ne eblas! Tamen, kuraĝe antaŭen! Mi nepre volas supreniri la monteton, ĝi estas sufiĉe malproksima, certe tie mi trovos la ... finon! Ĉapo malhelpas kompletan „sekiĝon“ de la cerbo, ankoraŭ bone mi sukcesas rezoni: do, ek tien, supren! Leporo subite aperas kaj subite malaperas en iun kaŝejon. Verda estas la deklivo, sed ne pro herboj: verdkoloraj la ŝtonoj, tajlitaj kiel kristaloj, kubo-, prismo-formaj: mirindaj! Spirado iom pli rapida, ekmarŝo iom pli hasta, baldaŭ la pinto! Ne, ne estas la fino, alia pinto iom pli fora! Ek al tiu! Ankoraŭ unu alia, kaj alia, kaj alia: senfine. Kaj mi rigardas horizonten, kie montetoj ondumadas unu post la alia, en plej diversnuancaj koloroj de la grizo, kio denove atentigas ke la foro estas senfina. Kaoso, daŭra fajfado de policanoj, hupado senfina de ŝoforoj (jes, ankaŭ tio senfina!), dekoj kaj dekoj da veturiloj marŝas senhalte unu post la alia. Transiri straton por piediranto estas kiel defii la sorton: aŭ tute sendifekte oni atingos la vid-alvidan trotuaron aŭ ...oni rezignu kaj atendu almenaŭ noktomezon por reiri al tranoktejo. Surprizas, kiel oni tuj adaptiĝas al la lokaj cirkonstancoj, kaj post unua-, dua-, tria-foja hezitemo oni eklernas la lecionon, kaj, imitante la lokanojn, kuraĝas zigzagi inter unu aŭto kaj la alia, por fine saviĝi de aŭtomobila surtretiĝo. Moderno, malmoderno, novklasikstilaj palacoj, ruĝaj, ruĝetaj, lazuraj, verdetaĵaj, duonkonstruitaj nubskrapuloj, betono, skafaldoj, lignaj domoj, blanka geedziĝa palaco, la templo de Choijnlamao, vitro-spegula blua konstruaĵo velo-forma, vastega placo kaj jen li, Li, la heroo, la mita heroo: Ĉinggis-Khaano. La marmora scenejo Lin ĉirkaŭanta perfekte taŭgas: imponas la bronza statuo, kiu sentigas la gravecon de lia superrega rolo en la 2 historia de Mongolio. Ĉeflanke la filoj *Ogedei* kaj *Kublai*, pli antaŭe gardas la enirejon al la

monumento du famaj militistoj, *Boruchu* kaj *Mukhlai*. Tiu loko estas la kerno de Ulan-Batoro: tie okazis (kaj okazas) multaj gravaj eventoj: revoluciaj, politikaj, ceremoniaj, paradaj kaj eĉ koncertaj. Varmega suno daŭre bruligas onin: nepras trovi ŝirmejon, kie trinki ion kaj ankaŭ manĝi por reakirila perditan energion. Ne malfacilas trovi ĝin, nur malfacilas la elekto: jen tiu, tute tipa, simpla sed la fakto ke tie sidas multaj lokanoj, sugestas ke certe estas la perfekta loko kie bonguste manĝi (almenaŭ laŭ nia okcidenta pensmaniero!). Jam sidi en freŝeta medio kaj sensojfiĝi per „Chinggis“- biero, pli komfortigas kaj do, oni kuraĝas alpaŝi al dua malfacilo: legado de la menuo en cirila alfabeto! *Skolte khool, buuz, khuushuur, tsuivan, khuurag...* je fermitaj okuloj mi metas mian fingron tie... elekto farita! Je nia sano, ni tostu per freŝa biero kaj manĝu apetite kion mongoloj jam de jarcentoj frandeme manĝas! Kiom malproksima la teatro! Ni iru taksie, troas la distanco kaj tiu varma suno, kiu tamen, matene aŭ vespere, kapablas doni tiel grandajn emociojn, farbante la ĉielon per revigaj koloroj, jam elkuiris nin. Kia spektaklo! Aŭskultado de muziko kaj kanto, tiu fama gorga kanto, *khoomii*: sentoj plejdiversaj eksplodas en la interno, oni eksentas artfajraĵojn en sia memo, oni ekemas plori pro la intensa emocio onin kaptanta. Kia muziko! Ĝi elvokas galopadon de ĉevaloj en la vasta senfino. Daŭre revenas tiu sento pri senfino, senfino kiu liberigas vin el ĉiuj ĉenoj, vi eksentas vivi libere, vi ŝvebas en la ĉielo, en la nuboj, tra tiuj nepriskribeblaj koloroj de sunleviĝo, tra l' ruĝooranĝo de la astra malapero malantaŭ la horizonto, transportata de tiuj magiaj kanto kaj muziko Vasteco, senfino, senlimaj horizontoj, verdo de la montetoj, flavo de la dunoj, bluo de la ĉielo, agloj, falkoj, ĉevaloj, ŝafoj, kaproj, kameloj, vizaĝoj skulptitaj, bronza, sun-brunigitaj, okuloj gajaj, buŝoj ridetantaj - intensaj emocioj plenigas la koron kaj la menson, emocioj neniam antaŭe spertitaj. Ĉio ĉi, kaj ankoraŭ multo pli, kion bedaŭrinde malfacilas surpaperigi, estis kaj estas por mi Mongolio, la tero de la blua ĉielo, la lando de preroj kaj dezertoj, la teritorio de Hunoj kaj Ĉinggis-Khaano, la hejmo de la mongoloj, kiuj vivas en la nuntempo fieraj pri propraj historio, lingvo, muziko, kostumoj kaj vivstilo, kiuj konservas ame siajn de antaŭ jarcentoj tradiciojn, akceptante samtempe la modernon kaj ties neeviteblajn transformigojn, sen forgesi pri la graveco daŭre gardi la grandajn valorojn de sia antikva kulturo.

Elda Doerfler

**6a Azia Kongreso de Esperanto en Ulanbatoro
19-23 julio 2010**

“Bonvenon en Mongolio, karaj samideaninoj!” Ridetoj, delikataj manpremoj, tute gajaj vizaĝoj, malgraŭ la horo! Ni alvenis je la 6a kaj 45 minutoj matene, kun pli ol unu horo de malfruo, lacaj, iom nervozaj kaj malpaciencaj (okcidenteca sinteno!). La mongola grupeto, kiu certe ellitiĝis je la 4a matene, por atingi ĝustatempe la flughavenon kaj akcepti nin, elmontris nenan maltrankvilon, nur grandan ĝojon nin renkonti. Tio tuj helpis nin forgesi la streĉon de longa vojaĝo. Jen alvenis aliaj, ĉiuj eŭropanoj, kaj niaj gastigantoj akompanis nin per aŭtobuseto al la hoteloj. Nun, ĉio en ordo: depono de valizoj, ioma dormetado kaj denova renkontiĝo kun lokanoj, kiuj malgraŭ siaj, certe multegaj, zorgoj pro prikongresa aranĝo, sin metis je nia dispono por nin helpi en niaj unuaj rilatoj kun fremda lando. Tamen ne per kongreso komenciĝis nia aventuro en Mongolio sed per tri-taga ekskurso al la antikva ĉefurbo Ĥaraĥorum, al budhista templo Erdenezuu, al Nacia Parko Ĥustaj, sed pri ĉio ĉi vi aŭdos kaj vidos en septembro, ĉe TEA-sidejo, dum vendredaj vesperoj dediĉitaj al Mongolio. La kongreso okazis en la prestiĝa Hotelo Ĉinggis-Khaano. Kiel ĝi estis? Ne sukcesa, sed sukcesega! Aliĝis entute 254 personoj el 33 landoj kaj efektive ĉeestis 215 el 27. Do, alta nombro da partoprenantoj. En salono de hotelo okazis la Interkona Vespere: abundis varieco de koloroj, gajeco de vizaĝoj, interŝanĝo de salutoj kaj unuafaj sinprezentadoj. Jes, vi komentis, kiel kutime... Ne, laŭ mi ne estis kiel kutime: en tiu etoso estis io speciala kio spicis

la tutan kunestadon: ĉu jam ŝamano uzis sian povon spiritan, por ke homoj, venintaj el plej diversaj mondopartoj, transiru siajn internajn limiĝojn, malkatenu siajn subkonsciajn ĉenojn, kaj estu nur homo inter homoj, malfermita al aliuloj, preta ĉiun ajn akcepti kaj kompreni, aŭ ĉu simple temas, ke finfine ni estis inter esperantistoj en Azia Esperantujo? Kiel ajn, vere ĝuinda tiu vespero. Dimanĉon matene, la 20an, oficiala malfermo de la kongreso per saluto de la prezidanto Lee Jung-Kee, sekvita de bondezira saluto de la ĉefministro de Mongolio, legita de anstataŭanto. UEA-estrarano Hori Yasuo preparolis la kongresan temon “Azia harmoniigo per Esperanto”, post kio sinsekvis salute landaj reprezentantoj, inter kiuj ankaŭ Edvige, kiu, nome de TEA, transdonis al la reprezentanto de la ĉefministro libron, verkon de d-ro Colleoni, eksa honorkonsulo de Mongolio en Triesto, en kiu estas priskribitaj la rilatoj komercaj kaj kulturaj inter nia urbo kaj Mongolio. Post tio, komuna foto sur la hotela ŝtuparo, apud kelkmetra afiŝego reklamanta dulingve nian kongreson, sub la flirtantaj flagoj mongola kaj esperanta: bonega fino de tre ĉarma malferma ceremonio. Tre varia la programo disvolviĝanta en la sekvaj tagoj, eĉ tro da diversaj eroj, malfacilis la elekto. Mi aŭskultis la prelegon “Rememore de Lee Chong-Yeong”, la korea esperantisto, prezidanto de UEA en 1995-1998, kiu aparte distingiĝis kiel dinamika kaj iniciatema gvidanto. Inter alie li iniciatis la unua Nitobesimpozion kaj la Manifeston de Praga. Pro siaj elstaraj meritoj en la esperanto-agado li estis elektita Honora Membro de UEA. Krom prezenti lian tutan vivon, la preleganto donis la eblon al publiko aldoni kelkajn me3

Unika ZEO sub la maro!

La plej okcidenta parto de duoninsulo Krimeo - duoninsulo Tarhankut - estas unika loko de belegaj golfetoj, kie la fundo estas travidebla je 12 metroj. Tie estas subakva muzeo. Komence de la *"rekonstrua periodo"* en Sovetunio oni ofte forĵetadis bustojn de bolŝevikoj. Subakvistoj aranĝis tie en la maro *"aleon de bolŝevikoj"*, poste aleon de eminentaj personoj kaj rezulte aperis unika subakva muzeo. En la jaro 2008 ĝuste apud tiu loko okazis ukrainiarusia E-renkontiĝo **IET-1** (*Internaciaj Esperantaj Tagnoktoj*), kiun partoprenis ĉ. 180 esperantistoj. Dum la renkontiĝo la partoprenantoj solene inaŭguris Esperanto-Aleon, en kiu la unuaj bustoj estis tiu de Zamenhof kaj la fama blinda esperantisto, vojaĝanto, verkisto Vasilij Eroŝenko. La 20- kilogramajn, 45-centimetrajn bustojn kreis konata skulptisto Sergej Fjodorov. Ĉi-jare komence de julio en la sama loko okazos **IET-2**, dum kiu en la Esperanto-aleo aperos tria busto – de fama Esperanto-pioniro, svedo Valdemar Langlet: unua E vojaĝanto, unua prezidanto de Sveda EFederacio, redaktoro de la dua Egazeto “Lingvo Internacia”, fondinto de la dua E-klubo en la mondo kaj ... parulo de la unua internacia esperantista geedziĝo. Ne preterlasu eblecon partopreni **IET-2**. Pliajn informojn dezirantoj povas trovi ĉe <http://esperanto.net/iet2010>

Informis: Jefim Zajdman jefim_z@mail.ru

Fonto: Ret-eventoj

Alia sukceso de la itala komiksarto parolas Esperanton: **Lupo Alberto**, de la grava Silver.

La plej fama helblua lupu en la mondo, lia amrilato kun la kokino Marta, lia amikeco kun Henriko La Talpo kaj ĉiuj batoj kiujn li ricevas el la hundo Moseo. La unuaj bildstrioj, kaj la plej bonaj kaj amuzaj vinjetoj, ĉiuj grupigitaj en unu komikslibreto. Eldonita de Edistudio, IEJ kaj la Torina Esperanto Centro jen nova, mirinda ĉefverko, kontraŭ nur 7,5

eŭroj (send-kostoj ne inkluzivitaj). 144 paĝoj, enhavo blanka-nigra, kolora kovrilo. La libro estas aĉetebla ĉe: IEJ - iej.esperanto.it; CET - www.arpnet.it/esper;

Edistudio - www.edistudio.it

morigajn vortojn pri tiu elstara personeco de la Azia kaj tutmonda Esperanto-movado, kio vere kortuŝis la ĉeestantaron. Oni ne povis ne ĉeesti la prezentojn pri “Historio de Mongolio”, “Mongola Arto kaj Kulturo”, “Esperanto-movado en Mongolio” kaj “Rinchen kaj Dogsuren”,

la esperanto-pioniroj kaj ĉefaj aktivuloj en Ulanbatoro: danke al tiuj eblis konatiĝi pli profunde kun lokaj kulturo kaj esperantismo. Kompreneble, mi vizitis ankaŭ kurson, la kurson “mongole eksprese”, sed miaj lernorezultoj estis sub nulo: mi plene fiaskis kaj rezignis pri alparolado mongole kaj daŭrigis esperante. Emociigaj, impresaj, kortuŝaj, ĉiuj spektakloj prezentitaj. Dum la Nacia Vespero, okazinta en la Armea teatro, fare de ensemblo apartenanta al la mongola armeo, oni plene ĝuis la multfacetajn kaj mirindajn aspektojn de muzika, danca kaj kanta artaĵoj. Aparte fascina la spektaklo, proponita la postan vesperon de grupo de geknaboj, devenantaj de malriĉa kvartalo, kiuj estas vartataj kaj gvidataj de bonfaruloj: kvinjaruloj ĝis, pli-malpli, dekvarjaruloj, prezentiĝis korse, dance kaj kante. Vere ne eblas trovi taŭgajn vortojn por propraj sentoj: temis pri etaj sed grandaj artistoj, kiuj kun ĝojo kaj per tiu entuziasma ardo, kiun nur junuloj povas havi, esprimis sursceneje sian fieron esti mongoloj. Kaj fine, Internacia Vespero: pli ol dudek partoprenantoj paradis elmontrante la buntan variecon de siaj kulturoj per naciaj kostumoj, per ludado de pluraj, eĉ ne tiom konataj, instrumentoj, per dancoj, kantoj ktp. Spektaklo inda je prezento dum UK.

Finiĝis la kongreso merkredon la 23an per bela ceremonio, dum kiu salutis la kongresanojn la nova prezidanto de KAEM, prof-ro Sasaki Teruhiro el Japanio. Aplauddegoj tondris en la salono kiam LKK-anoj paradis antaŭ la podio. La adiaŭo longe daŭris, ĉar partoprenantoj ne emis forlasi la salonon, kaj multaj deziris atesti sian kontentecon per laŭdaj vortoj direktataj al ĉiuj organizantoj. Ne unuafoje mi ĉeestis Azian Kongreson. En 1999 mi partoprenis en Hanojo, Vjetnamio, la 2an, kaj ankoraŭ nun la memoroj estas tre vivaj kaj freŝaj pro tiu eksterordinara sperto. Mi kredas, ke la samo okazos ankaŭ ĉifoje, se arteriosklerozo ne malhelpos la daŭran rememoron pri la mirindaj travivaĵoj pasigitaj en la bluĉiela Mongolio. Kion konklude diri: dankon al vi, mongoloj, pro via gastamo kaj gastemo, pro via firma engaĝiĝo en via agado poresperanta en cirkonstancoj certe ne facilaj, pro la bonega organizado de ĉi kongreso, kaj grandan dankon al vi, Esperanto, kiu donis al mi la eblon eniĝi en senkompare fascinan medion, konatiĝi kun diverslandaj homoj kaj aparte kun azianoj, kompreni kulturojn tute diferencajn de la miaj, kaj ĉefe ilin akcepti kaj kundividi: kaj tio ĉi estas riĉaĵo, kiun neniu, iam ajn, sukcesos forpreni de mi! **Elda Doerfler**

/El TEA-BULTENO, 13a jaro Julio - Aŭgusto 2010 Numeroj 7-8/Permesita de la eldonistino Elda Doerfler/





Ruĝa ŝlimo en Transdanubio

Pro la rompiĝo de la digo de Aluminfabriko en Ajka, la ruĝa ŝlimo inundis du setlejojn en Transdanubo. Doktorino Helena Bikszády (Miskolc), petis nin por meti la suban mesaĝon en nian retrejuon

Je ŝia peto ni komunikas peton de Nikalao Mód, pastro, parokestro de Devecser kaj Kolontár:

„Estimata adresato!

Mi petas vin laŭeblece por helpi loĝantojn de la menciitaj setlejoj. Konkrete ni bezonas sitelejojn, ŝovelilojn, gumogantojn kaj forĵetebajn vestaĵojn, gumobotojn. Ĉi tiujn aĵojn oni povas sendi al paroĥoj de Devecser, aŭ Kolontár. Oni povas sendi ankaŭ monan helpon / Banka Konto: 12084003-00103523-00100003/ kaj vi devas signi: „monhelpo”.

Dankon:

Nikalao Andrónyi – Urbestra Ofico – Konstrua kaj Urbomastrumada Oficejo.

H-8400. Ajka. placo Szabadság 12.

Tel: +36/88/521-125 / Fax: +36/88/212-794

Poŝtelefono: +36/30/630-2565

Katarina Bangha

+36/30/3500-420

Datrevenoj

Pro la naturaj katastrofoj atakitaj nian patrujon, dume ni preskaŭ forgesis rememori pri la sekvaj gravaj datrevenoj.

- 1) **Francisko Erkel** estis muzikiginto de Hungara Himno. Li naskiĝis en urbo Gyula, la 7-an de novembro 1810. Li mortis la 15-an de junio 1893.. Li estis komponisto, dirigento kaj pianartisto. Li estis kreanto de niaj naciaj operoj. Okaze de 200-a. jardatreveno de lia naskiĝo, Stefano Kassai pianartisto prezentis grandan sukceson atingitan pianludon antaŭ malmultenombra, sed entuziasma publiko, en Miskolc, la 8-an de oktobro 2010 en la Departementa Biblioteko „II. Rákóczi Ferenc”. Li prezentis pianludojn el operoj de Erkel:
 - Maria Bátor – Marŝo
 - László Hunyadi – Cignokanto / adiaŭa kanto, la unua variado/
 - Erzsébet - /Elizabeta – Hungara marŝo/
 - Dózsa György - /Georgo Dózsa – Adiaŭo de Rózsa (Roza)
 - Sarolta – /Ŝarolta, tuto kaj danco /finalo de la unua akto/
 - Tri albumaj folioj – A-moll, D-moll, D-dur.
 - Variadoj de opero „La Artifiko” de Andreo Bartay.

La sinjoro pianartisto promesis kune kun la ĉeestanta historiisto pri muziko, sinjoro Karlo Sziklavári, por sendi al nia retrevuo „Nordhungaria Informo” konigan informilon pri arto de Francisko Erkel.

- 2) **Leo Weiner** iĝis famulo de la hungararo pro liaj orkestraj komponaĵoj, ĉambromuzikaĵo, fortepianaj komponaĵoj kaj muzikartaj skribaĵoj. Li estis muzikpedagogo kaj unu el la plej famaj komponistoj de la hungararo. Li naskiĝis la 16-an de aprilo 1885 kaj mortis la 13-an de septembro 1960 en Budapeŝto. Li instruis muzikon inter 1908 kaj 1957. Stefano Kaŝsai rakontis pri li, ke en la nuna Hungario ĉiuj elstaraj muzikistoj estis gedisĉiploj de Leo Weiner. Stefano Kassai, pianartisto ankaŭ el muzikverkoj de Leo Weiner prezentis pianludojn. Ili estis:
 - Tri hungaraj dancoj – Vulpodanco, Valso de Marosszék, Csürdöngölő/ĉurdongolo: speciala hungara danco/
 - Passacaglia op.18

Ni gratulas al sinjoro Stefano Kassai, pro sia virtuoza pianoludo, kio atestis lian eminentan maturiĝintan arton. Ni gratulas ankaŭ al sinjorino Bodnár: Ágnes Veréb, bibliotekistino, kiu organizis sukcese la tutan programon, inkluzive la ekspozicion pri Francisko Erkel.

Rememoroj pri niaj famuloj

Antaŭ 30 jaroj forpasis en Miskolc D-ro Ludoviko Györy Nagy, departementa Esperanto komitata prezidanto. Ĉe lia tombo en la miŝkolca Avaŝ-monta Kalvinana tombejo ni faris aŭtunan purigadon kaj surtombon ni metis la pietajn florojn de la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo.

Same ni metis niajn florojn al memorlokoj de Kalocsay en Abaujszánto kaj ĉe kriptoj de Kalocsay en tombejo de Máriabesnyő.

Ni planas aranĝi rememoran feston en Abaujszánto en 2011, okaze de 110. datreveno de naskiĝo de D-ro Kolomano Kalocsay. Por preparoli tion ni ne povis renkontiĝi kun sinjoro Georgo Madár, urbestro, sed ni pritraktis nian planon kun direktorino de la Kulturdomo (Sinjorino Burkus) kiu same metis florkronojn, - nome de la urbo - al memorlokoj de D-ro K. Kalocsay.

Pri la ĝusta tempo de la atendebla okazontaĵo ni informos pli malfrue niajn karajn legantojn. Ni rememoros ankaŭ pri niaj esperantistaj antaŭuloj dum Tago de Mortintoj, dezitante al ili pacan ripozon.

Geedzoj Pásztor





Fotis: László Pásztor



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>